

# Sennacieca REVUO



Ĉiam kaj ĉie ni estu verdiraj. Tia estu la moto de ĉiuj „Satanoj“.

Organo de la Tutmonda Laboristaro

Antaŭe Esperantista Laboristo

Jara abono: Anglio, 5 ŝil.; Aŭstrio, 150 kr.; Belgio kaj Francio, 9 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 30 lev.; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 25 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 6 kr.; Germanio kaj Finnlando, 25 mk.; Hispanio kaj Portugalio, 7 pes.; Hungario, 60 kr.; Italio, 12 lir.; Nederlando, 3 g.; Polio, 300 mk.; Svisio, 6 sv. fr.; Usono, 1 1/4 dol. Oni pagu prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj. — La abonoj komenciĝas en Januaro kaj Julio.

REDAKCIO: **E. LANTY**

24, Boulevard Beaumarchais — PARIS XI (Francio)

ADMINISTRACIO: **L. GLODEAU**

177, Rue de Bagnolet — PARIS XX (Francio)

## Je la lumo de la sperto

Retrospektive ekrigardante nian postmilitan movadon, ni konstatas, ke kelkaj famuloj favore rekomendis esp.on. Memorige mi citu kelke da nomoj: La nobla pacifisto *Romain Rolland*, la scienculo *Ch. Richet*, la revoluciulo-verkistoj *Henri Barbusse* kaj *M. Gorkij*, la poeto *Edwin Markham*, la saĝulo *Han Ryner*, la aŭtoritata lingvisto *A. Meillet* kaj aliaj.

Gravaj organizaĵoj voĉdonis deziresprimojn por esp.o, kaj eĉ kelkaj, kiel la *Internacio de l' Militintoj* kaj la *Edukista Internacio*, per kongresaj decidoj alprenis ĝin kiel sian oficialan lingvon.

Nu, kia estas la rezultato de tiuj aproboj kaj decidoj? Ni bedaŭrinde devas konstati, ke ĝi estas preskaŭ nula.

Grandan esperon ni havis rilate la sintenadon de Sovjet-Rusio pri nia afero. Kaj jen, lastatempe ni eksciis, ke la rusa Registaro seninteresigis pri nia propagando, eĉ likvidas la poresperantajn organizaĵojn, kiuj de nun estos nur privataj entreprenoj.

La *Studa Komisiono por alpreno de helpa lingvo ĉe la III<sup>a</sup> Internaciano* jam ne donas vivsignon. Ĝi ne atestas la ricevon de dokumentoj kaj eĉ ne respondas al inform-petoj. De tiu flanko ni ankaŭ ne atendu gravan rezultaton, se ni ne volas senreviĝi.

Kaj la famuloj kiuj rekomendis esp.on, ĉu mem ili lernis ĝin? Eble ili lernetis, sed certe estas, ke praktike ili ne uzas nian lingvon. Pro tio iliaj aproboj kaj instigoj estas nur duonvaloraj, ĉar la ekzemplo ne apogas la konsilon. Estas tamen neduble, ke se iu talenta verkisto penus por funde scipovi esp.on kaj verkus per ĝi, nia afero antaŭenmarŝas grandpaŝe.

Tion ni ne esperu: La literaturistoj konsideras sian tempon tro multkosta por dediĉi iom da ĝi al funda lernado

de esp.o. La politikistoj estas tro okupataj solvi (?) ĉiutagajn problemojn por interesiĝi pri nia afero.

La sukceso povas veni nur de malsupre. Estas nia modesta tasko penetrigi en la vivon la uzadon de internacia lingvo.

\* \* \*

Ni ekrigardu alian flankon de la problemo: la kursojn. Ĉu la rezultato estas tie kontentiga? Multloke instruistoj plendas pro malsukceso. En "Kroniko" ofte estas sciigate pri malfermo de kursoj kun multnombra lernantaro. Sed plej ofte oni silentas pri la fermo por ne konfesi fiaskon. Estas do necese, ke ni atentu ankaŭ pri tiu fakto por orienti nian propagandon.

Oni tro klačadis, ke esp.o estas "tiel facile lernebla!", ke oni povas encerbigi ĝin en "kelkaj semajnoj" da lernado. Tio estas malvera. Kaj la laboristoj tiele trompitaj for-lasas la kurson je la unuaj malfacilaĵoj. Sufiĉu diri la veron: Esperanto estas tre pli facile akirebla ol iu ajn nacia lingvo.

Ni precipe insistu al la varbotoj pri la nepra neceseco de komuna, sennacieca lingvo por la vivo de Internaciano. Ni ne laciĝu montri la nekonsekvencon de la t. n. internaciistoj, kiuj ne konscias pri la graveco de nia propagando. Ni demonstreu, ke ili konstruas sur sablo, dum ni starigas nian konstruaĵon sur roko; ke ili komencas meti la tegmenton en malplenecon dum ni pacience masonas fundamenton. Ni konigu al la amaso, ke niaj ĉefoj estas preskaŭ ĉiuj pli malpli plurlingvanoj, pro tio ricevas delegitecon al la internaciaj kongresoj kaj tute ne estas interesataj, ke oni malaperigu la lingvajn malfacilaĵojn. Ni klarigu pri la grandega valoro de internaciaj rilatoj por naskiĝi ĉe nia koro veran, sinceran senton de amikeco al tutmondaj kamaradoj. Ni senlace ripetu, ke tiu, kiu ne havas amikojn en ĉiuj landoj ne rajtas sin konsideri kiel indan internaciiston.

Pli trafe: Komprenigu ni, ke estas jam tempo por celi al universalismo, al sennaciismo; ke la esperantisto-revoluciuloj komencis krei la ĉelon de tiucela organismo: nian S. A. T. Ni montru ankaŭ per nia nekompromisemo kun la burĝaj esp.istoj, ke ni estas la plej konsekvencaj el la revoluciuloj.

\* \* \*

Sed antaŭ ol almiti la internaciistojn, kiuj ne sufiĉe atentis pri nia propagando, estas unue necese, ke la esperantistoj mem plene konsciis pri la graveco de la mondlingva problemo. Estas urĝega tasko formalaperadi el niaj rondoj ĉian neseriozecon, ĉiun emon al blufado kaj trograndigo; unuvorte ĉion hereditan el la burĝa movado.

En niaj rondoj estu ne nur verdstelportantoj, sed veraj praktikantoj de la lingvo. Ĉar estas konstata fako, ke multaj ne penas sufiĉe ellerni la lingvon, ni devas instigi ilin per ia konkuremo. La aniĝo al S. A. T. povos esti instigilo. Ĉiu deziranta aniĝi devus pruvi, ke fakte li uzas esp.on. Komprenable ni ne povas postuli, ke aniĝdeziranto perfektege estru la lingvon. Cetere estas en ĝi tro da punktoj pri kiuj niaj "eminentuloj" ne interkonsentas. Ili eĉ ofte riproĉas unuj la aliajn, pri nekorekta uzo de esp.o. Eĉ Zamenhof estas kulpigita pri gravaj eraroj troviĝantaj en lia verkaro. Sufiĉas postuli ke ĉiu estu kapabla bone komprenigi sin per esp.o. Kiam oni scias, ke por fariĝi "Satano" estas unue necese scipovi esp.on, tio estigos en la kursoj tre efikan instigon por la ellernado.

Oni bonvolu ne konkludi el miaj premisoj, ke iel mi estas pesimista. Tute ne. Mi nur celas atentigi la Kamaradaron pri danĝero de iluzioj kaj pri forfaligendaj baroj; pri neceseco de longdaŭra, sistema, metoda kaj zorge antaŭpreparita klopodado por varbi la indiferentulojn kaj silentigi la kontraŭulojn. Ni kvazaŭ transirante grandan arbaron el rutino kaj antaŭjuĝoj, devas iri malrapide, sed kuraĝe dishaki por fari lumon kaj forpeli la nigrajn bestojn embuskataj en densejoj.

La propagandistoj estas ja pacaj batalantoj, sed tamen batalantoj. Ili do devas agi kun plej scienca strategio kaj plej zorgema antaŭpreparo. Kiam oni ekiras militon nur entuziasmigite kaj ne preparite malvenko okazas.

La batalo por trudi esp.on al la Internaciistaro apenaŭ komencis. Ni antaŭeniru celrigardante, kun la plena konscio, ke la objekto por kiu ni batalas estas nobla kaj inda je ĉiaj oferoj.

E. LANTY.

## Municio por Sennacieca Revuo

(Ricevita dum Januaro)

**Argentino:** Barrot 12 fr. — Leighton 4,15 fr. — P. Beers 10 fr. — **Francio:** Ivry 5 fr. — Lamarche 5 fr. — Vittecoq 5 fr. — Ed. Billiard 3 fr. — Tiard 1 fr. — Aumeunier 3 fr. — Lefèvre 5 fr. — Couttet 1 fr. — G. Ruperto 5 fr. — J. Habert 10 fr. — Olszanski 5 fr. — Benefico okaze de la parolado de L. Révo 10,70 fr. — E. Lanty 100 fr. — L. Glodeau 5 fr. — **U. S. A.:** Biensjanski 11,50 fr. — **Germanio:** G. Gerbier 1,25 fr. — W. Vaas 3 mk. — H. Kappelmann 5 mk. — **Litovio:** Alseida Luidas 29 mk. — **Sumo:** 202,60 fr. fr.; 37 mk. G.

## Spirita Municio<sup>(1)</sup>

### Antaŭparolo de esperanta lernolibro

de HENRI BARBUSSE

Ni povas diri, ke el ĉiuj ĝis nun de la homaro travivintaj historiaj epokoj, la nuna estas la plej evoluige transira epoko. La multnombraj homamasoj, el kiuj konsistas la vivo de la ter globo kaj la historiesenco, fine ekvekiĝas post longega dormado daŭranta de la plej malproksima pratempo, de la konfuza tempo, kiam mitologio kaj realeco kunmiksiĝadis. Ne nur la leĝoj kaj institucioj, sed eĉ iliaj fundamentoprincipoj ekmontriĝas kvazaŭ ruste disfalantaj kadukaĵoj. Ĝi estas grandioza pretiĝanta vekigiĝado kaj socia definitiva renoviĝo nune ĝermanta.

Sed la progresoj el kiuj konsistas tiu gravega kaj senĉesa Progresado, kiun ni ekvidas tra la jam ĝojigaj perspektivoj de la estonteco estas tiel diversaj kaj multaj, ke oni vere ne ĉiam scias kiel agi por kunigi tion, kio ekzistas al tio nepre ekzistonta. Kiel ni unue devas agi? Por bonordigi niajn agojn kaj metode efektiviĝi la renovigon de la harmonia leĝaro al kiu obeas ĉio ekzistanta, estas al ni necese nin turni al saĝeco, kiu estas la plej altvalora apanaĝo de la homo. Se la homoj volas sin liberigi je siaj multcentjaraj katenoj kaj je ĉiuj legendoj kaj eraroj — ankoraŭ pli malbonaj ol katenoj — kiuj ĝis nun devigis ilian anaron je sklava obeado, estas unue necese, ke ili sin reciproke komprenu. Por ke ili sin interkomprenu, ili nepre devas paroli saman lingvon.

Por kompati aliulan suferon kaj por ribeli kontraŭ maljustaĵo, certe ne estas necese paroli saman lingvon, kiun la viktimoj parolas. Estas tamen io vera, ke la bonaj emoj instigantaj nin ami unuj la aliajn, ke la saĝecaj aksiomoj vidigantaj al ni similaĵojn kaj solidarecojn fundamentajn estas preskaŭ ĉiam senefikaj praktike pro lingvokonfuzo, kiun iu sagaca biblia mito montris, kiel homan suferigilon elpensita de la dioj por puni la homojn.

La homoj kiuj unue konceptis la ideon pri internacia lingvo havis la gloron kaj genion racie komenci la ekrealigon de la homarkunigo. Estas ja plej evidente, ke se ĝis nun la homamasoj estas tiel malamike apartigitaj, tio estas kaŭzita de artefaritaj procedoj, kiujn inteligento kaj konscio malaprobas. La sincera dialogo de du homoj sinceraj, kiuj oficiale estas malamikoj nur pro tio, ke ili apartenas al du nesamaj landoj sufiĉas por fatale montri la tutan socian mensogon. Tiel sensignifa, kiel ĝi eble ŝajnas — meze de la disvolviĝo de ĉiuj gravaj ideoj pri frateco kaj prudento — la »donaco« de la internacia lingvo estas fakto tiom pli grava kaj senkompara, ke ĝia praktikado povas esti tuja. La lingvo internacia senembarasigas la

(1) Henri Barbusse verkis tiun antaŭparolon por „Cours Rationnel et Complet d'Espéranto“, kiun eldonis antaŭnelonge la „Fédération des esperantistes révolutionnaires de langue française“. La tradukon ni danke ŝuldas al unu el la verkintoj de la lernolibro. Nedubeble niaj legantoj povos profiti por sia porvarba propagando de tiu vere varbopova materialo. Ili traduku nacilingven tiun antaŭparolon kaj konigu ĝin al siaj samlandanoj. Se tradukoj aperos en gazetoj oni bonvolu nepre citi la nomon de nia revuo — kun la adreso se eble — kaj sendi al ni du ekzemplerojn de la koncernaj gazetoj. — Red.

vojon kaj faciligas la eldiradon de la vero: ĝi estas ĉio, kion deziras la tiranitoj kaj iliaj amikoj. Estas memkompreneble, ke ti-kiuj suferas el samaj suferoj kuniĝu. Prisciada kaj prisaga verko, la komuna lingvo estas la unua ilo dank' al kiu, ĉiuj proletarioj kaj suferantoj povos komuniki inter si.

Oni povus esti timigata de la malfacilaĵo, de la praktikada komplikado aldoni al ĉiuj siaj kutimaj okupadoj la lernadon de nova lingvo, se tiu, kiu nune definitive superstaras super ĉiuj aliaj — antaŭaj kaj postvenontaj provoj — Esperanto ne estus elpensita kun tia kvazaŭ mirakla kaj perfektega simpleco. Se la naciaj lingvoj estas tiel malfacilegaj, tio devenas el ilia vortoriĉeco mem. Ĝi estas ankaŭ pro tromultnombro de la esceptaj kazoj, pro specialaj apartaĵoj propraj je ĉiu el ili kaj pro nenombrebla nuancogamo. Unuvorte tiu malfacilaĵo estas kaŭzita de la pliperfektigo, ke la literaturaj kaj artistaj subtilaĵoj »ŝveligis« ĝis preskaŭ neesprimebla grado. Tiu vortmulteco de la t. n. vivantaj lingvoj pliriĉigas la artisman trezoron, sed pro tio, ke ĝi pligravigas la barojn jam starantaj inter la nacioj — pli akre defendante la animon de ĉiu granda lando kontraŭ la aliaj — ĝi tiamaniere ankaŭ malriĉigas la homojn.

Esperanto estas lingvo logika; ĝi estas skema lingvo senigita, kun scienca precizeco, je ĉia gramatika superflua komplikado. Ĝi konstruiĝas matematike kaj tiel dire aŭtomate. Kelkaj vortradikoj lerte kaj juste elĉerpitaj el la granda strangegega tutmonda vortejo sufiĉas. Poste kelkaj prefiksoj kaj sufiksoj, kelkaj reguletoj pri plej simpla kalkulo gramatika kaj tio ebligas, ke la lingvo sekvadu ĉiudirekte kaj ĉiunuan la komplikadojn de la penso.

Tiu admirinda lingva arkitekturo kies nerigida perfekteco estas simplega belaĵo rezultanta el profunda intuicio kaj el gravega laborado. Tiu nova libro ĝin montras laŭ maniero klarega. Ĝi unue provas komprenigi la spiriton de la esperanta konstruo. Ĝi montras ĝian simplegan strukturon, kaj oni tiam jam komprenas tiun lingvon kaj por plene ĝin ellerni, estas nur necesa negrava penado. Ni danku al la aŭtoroj, kiuj dank' al facilkomprenebla klareco de sia plano sukcesis verki lernolibron pli valoran ol la tamen tre taŭgaj jam ekzistantaj lerniloj.

Jen do laboro kiu de nun prezentiĝas, necesega kaj postulema, antaŭ ĉi-kiuj konscias pri sia homa profito kaj kiuj same konscias pri tio, ke la homaj profitoj estas kunfanditaj en unu sama. Dum longa tempo Esperanto estis konsiderata — eĉ de ti-kiuj okupiĝis pri ĝia disvastigo — kiel ia monduma amuzaĵo kaj plidelikatigo de la kosmopolita ĝentileco. Ĝi fine estos grava ilo por kunproksimigi la multnombrajn armeojn de la suferado kaj ekspluatado. Ni tion volu aŭ ne, Esperanto estas la ĉefa fakto el la gravega socia ŝanĝo pri kiu ni revas.

Ni ne devas diri: nune estas io pli grava kaj urĝa ol lerni Esperanton. Ni ne plu rajtas prokrasti tiun komunan devon prezentiĝanta antaŭ ĉiu el ni. La Sovjeta Respubliko ankaŭ nune havas alion por fari ol utiligi la fervoron kaj energion de siaj anoj igante ilin sin okupi pri neĉefajoj. Tamen Rusio — post kvazaŭ kontraŭdiroj, ni ricevis pruvojn pri tio — tre okupiĝis pri Esperanto.

Ĉie en la mondo estas jam esperantistaj rondoj. Estas da ili proksimume tiom, kiom da socialistaj rondoj: estas necese, ke ĉi tiuj lastaj almitu la aliajn. Estas necese, ke la esperantistoj, kiuj ĝis nun ne komprenis la tutan signifon de Esperanto laŭ la tuthomara liberiga vidpunkto fariĝu socialistoj. Ili jam de sia ĝisnuna agado, speciale internaciista kaj humana, estas preparitaj je tio: ĉiu socialisto devas esti esperantisto kaj ĉiu esperantisto devas esti socialisto.

El la franca tradukis *J. Habert*

## Ni agu laŭ niaj konvinkoj!

Kiam ni konsideras la dum 33 jara propagandado atingitajn rezultatojn, ni devas konsenti, ke ili estas grandaj, sed certe ĉiu ankaŭ konsentos, ke ili povus esti multe pli grandaj, se ni konsekvence agus laŭ niaj konvinkoj, laŭ tio, kion ni predikas. Bedaŭrinde multaj el niaj samideanoj ŝajne ne tre bone komprenas, pro kio ili batalas, aŭ se eĉ komprenas, tamen tiu celkompreno ne trapenetris tutan ilian personecon, ne fariĝis ilia vivgvidanta ideo. Kaj se iu ideo ne havas tutanime sindonajn apostolojn, pretajn nur por tiu ideo vivi kaj ĉion por ĝi oferi, ĝi ne povas baldaŭ konkeri la mondon. Tial mi pardonpetante permesas al mi rememorigi pro kio ni batalas.

Multaj niaj samideanoj ofte parolas pri graveco de internacia lingvo, sed praktike el ĉiuj iliaj agoj vidiĝas, ke ili nur frazdiradas: en ilia propra vivo E. okupas nur tre malgravan lokon — multaj el ili nek mem penas bone ekposedi lingvon, nek instruas tiun predikatan bonaĵon al siaj plej proksimaj familianoj. Vidante tion la mondo nepre devas pensi, ke E. predikanto hipokritas. Kaj estas klare, ke en vereco laŭ ilia kompreno E. ne estas preskaŭ ĉion ŝanĝonta potenco, devanta levi homaron sur pli altan evoluŝtupon, ideo, kies efektivigmomento estos naskiĝtago de plej mirinda kreitaĵo — de vera homarorganizo, sed nur mizera necesokaza kompreniĝilo. Kaj mi pensas, ke ni laboras por kunfandigo de aparte malperfekte anarĥie vegetantaj amebaj — nacioj en unu multe pli perfektan, pli potencon, belan kaj prudentan homarorganismon. Esperanto devas esti spiro de tutmonda homara organismo, kaj la naciaj lingvoj restos nur spirorganoj de apartaj organism-ĉelojnacioj. Kaj kiom pli alta estas la vivo de tuta organismo, des pli alta devas esti signifo de E. kompare je tiu de naciaj lingvoj. Komprenante tiel Esperanton mi vidas en ĝi entenatajn ĉiujn grandajn ideojn de nuntempo. Nun ĉie aŭdiĝas krio pri neceso spiritigi vivon. E. estas plej potenca ilo por dissemi veron, por ĉarmigi homojn per belo, por eduki homarĉelojn-naciojn por frateca amo kaj inspiri al la tuta homarorganizo amon kaj admiron al plej alta Idealo. Pro ĉiam ankoraŭ ne finiĝanta fratmurdado ĉiam pli laŭte aŭdiĝas dolorkrioj pri neceso pacigi homaron kaj nur ni esperantistoj havas en niaj manoj certan ilon fari el homaro veran familion. La fundamentoj de la tuta mondo estas nun ekskuataj per postulo socialigi vivon. Kiu ne vidas, ke sen E. tio ne estas ebla. Kaj kien ajn ni direktos nian rigardon, ni vidas, ke homaro

alpaŝis nun tian limon, ĉe kies transpaŝo estas necesa scio de internacia lingvo. Do mi pensas, ke E. estas tiom granda ideo kaj rekta necesajo, ke valoras, ke ni ankoraŭ nemultaj batalantoj por ĝi deturnu nin de servo al aliaj pli malgrandaj ideoj, kaj tutan nian vivon, ĉiujn niajn fortojn, ĉiun diritan kaj skribitan vorton dediĉu nur al E. Plugistoj de aliaj kampoj estas multaj — ni ne peku forlasante de sort' al ni konfiditan plej noblan laborkampon. Precipe vi, esperantistoj de malgrandaj popoloj, kiuj estas tiom tentataj fermiĝi en sia malgranda ĉelo kaj kunhelpi konstrui ĥinajn murojn inter la popoloj, ekmemoru nian altan mision, ŝtopu viajn orelojn je malicaj kantoj de nacismo, kaj iru rekte kaj celkonscie al konstruado de tut-homara kulturo, literaturo, kies lumradioj heligos la vojon kaj dolĉigos la vivon ankaŭ al viaj samlandanoj, samnaciaoj. Ĉesu senfrukte transversadi akvon el unu ujo en alian — ĉesu pereigadi tiom necesajn por ni, por vera konstrulaboro forton por senbezona tradukado de libroj en naciajn lingvojn. Ĉio komunehoma jam de hodiaŭ devas esti esprimata en E. kaj nur naciaj apartaĵoj en naciaj lingvoj.

Karaj samideanoj! Se ni volas atingi nian celon, komencu ni fine efektiviĝadi tion, kion ni predikas.

*Malgrandnaciono.*

## Najbarino

de GEORGO ĈULKOV (1916).

En la 1902<sup>a</sup> jaro al mi okazis pasigi la antaŭkristnaskan vesperon en malliberejo. Mi sidadis en multaj malliberejoj — en Moskvo, en Peterburgo, en Krasnojarsko, en la Aleksander — punlabor-malliberejo apud Irkutsko, — tamen tiu ĉi mia unua malliberejo, malgranda kaj provinca, estas ligita en mia animo kun rememoraĵo, — estas strange tion eldiri! — kun sentoplena, ĉarma kaj, se vi volas, iom amuziga rememoraĵo, kiu ĝis nun iufoje agitas mian laciĝintan koron. Duonjaron mi sidis en mia izoliga kamero, — kaj ĝis nun mi bone memoras la ŝtonan ĉirkaŭ muron kaj la apudan ĝardenon, apartenantan al frenezulejo, — ĝi estis ĉio, kion oni povis vidi el mia fenestreto; mi memoras la tagojn kaj noktojn, regule unuspecajn, sed por mi plenajn je profunda senco kaj mistero. Precipe mi memoras la kristnaskan antaŭvesperon, kiam mi tiel strange enamigis . . .

Oni alveturigis min en la malliberejon je la kvina matene. En la oficejo duondorma gardisto enskribis en dikan registrolibron mian nomon kaj profesion.

— Konduku lin en la kameron N<sup>o</sup> 13, — li diris, oscedante.

Soldato, kun ronda simplanima varioldifektita vizaĝo, forkondukis min tra la korto en la malliberejon. Blovis neĝa turnovento kaj estis ankoraŭ tute mallume. La soldato svingadis lanternon, kvazaŭ diakono incensilon, kaj pro la moviĝanta lumo niaj grandaj bluaj ombroj kurbigadis sur la neĝo. Ni marŝis laŭ vojeto, malbone purigita, kaj sub niaj piedoj la neĝo agrable knaretis. Tiu knarado ial rememorigis min pri la patra bieneto en Tambova gubernio, kie mi iam loĝis. Luj nepercepteblaj rememoroj pri mia infanaĝo, pri mia mortinta patrino traflugis mian animon, kvazaŭ malpezaj nubetoj, — kaj momente mi eksopiris pri libereco.

“Kiel strange, kiel kontraŭnature estas ke tiu ĉi soldato tuj enŝlosos min solan kaj li mem foriros por trankvile dormi”, — mi meditis, sincere mirante.

En malbonodora koridoro, kiun ni eniris, mi eksentis kapturton. Deĵoranto, bruigante feraĵojn, malfermis pezan pordon, kaj mi troviĝis en mia nova loĝejo.

“Jen kia estas la malliberejo”, — mi ekpensis, kiam la pordo brufermiĝis, kaj la soldato rigligis ĝin.

Tiu fergincado, verdire, dolorige resonis en mia animo.

Ĉirkaŭ tri semajnoj antaŭ mia aresto mi rimarkis, ke detektivoj postsekvas min. Unu fojon mi ekvidis paron da okuloj, kiuj fikse rigardis min el-sub pordego de granda domo, kontraŭ kiu mi troviĝis okaze tiumomente. Min ekmirigis tiam ia neklarigebla akra sento; ĝi ne similis timon, — pligustadire ĝi estis riskemo: al mi venis la deziro krii al la detektivō: „kaptu, kaptu min!” — kaj flugrapide ekkuri laŭ la strato . . .

Ĉiunokte mi atendis areston, — tamen mi ne sukcesis prepariĝi, kiel estis necese. Interalie mi ne ellernis la malliberejan alfabeton por interparoli per frapetado.

Kaj jen — jam la unuan matenon postkontrolo, kiam la observisto kun la gardosoldatoj foriris de mia pordo, iu ekfrapis mian muron. La nekonatulo frapetis: tri kaj kvar, poste — kvar kaj tri, plue — du kaj kvin, kvar kaj kvar, unu kaj kvin, unu kaj unu . . . Mi komprenis nenion.

La najbaro diligente frapetis ankoraŭ kaj ankoraŭ. Mi marŝadis en mia kamero, esperante trovi ie ajn sur muro ŝlosilon por la alfabeto, — sed mi trovis nenion. La najbaro ĉesis la frapadon. Tiam mi provis gratskribi sur muro la alfabeton po kvar literoj en vico, entute — naŭ vicojn. Kaj mi komencis malrapide frapeti laŭ tiu sistemo: “Oni malliberigis min hieraŭ. La esplordemandado ankoraŭ ne havis lokon” . . .

La najbaro ŝilentis.

Mi daŭrigis frapeti: “Ĉu vi de longe estas tie ĉi?”  
Silento.

Kaj mi denove: “Kial vi silentas?”

Neniu respondo. Mi komprenis, ke mia sistemo, ne estas ĝusta, ke necesas kunmeti la alfabeton iel alimaniere. Mi kvarfoje ŝanĝis la sistemon, — fine responde al mia frapado, la najbaro komencis ion frapeti.

Aŭskulti kaj kompreni estis pli malfacile, ol frapeti, tamen mi sukcesis deĉifri la frazon:

— Frapetu al N<sup>o</sup> 14. Tie sin trovas mia edzino.

Mi plenumis lian deziron, kaj malpeza virina mano respondis al mi:

— Dankon. Transdonu al li, ke mi sentas min bone. Li ne maltrankviliĝu . . .

Kaj iom poste:

— Mi vidis, kiam oni kondukis vin ĉi tien. Vi estas la verkisto Ĉ.? Ĉu ne?

— Jes mi estas la verkisto Ĉ.

— Frapetu al mia edzo la signalvorton “Blua bluzo”, — tiam li scios, ke vi estas nia; alie li opinios, ke oni sidigis apud ni spionon.

Mi obeeme komencis frapeti:

— Mi estas la verkisto Ĉ. Via edzino vidis min kondukata tra la koridoro . . . “Blua bluzo” . . .

— Mi estas tre ĝoja . . . Al mi plaĉas viaj rakontoj . . . Estas nur bedaŭrinde, ke vi estas pesimisto . . .

Al mia kamero proksimiĝis la gardistoj, sonorigante siajn ŝlosilojn, kaj nia interparolado ĉesis . . .

Post unu semajno oni permesis al mi legi kaj skribi, — kaj mi tre bone aranĝis min en mia kamero. Certe, kvar kvadrataj arŝinoj ne estas, Dio scias, kia vastaĵo, tamen mi facile kontentiĝis pri ĝi. Efektive, — duonhoro

da promenado en la mallibereja korto ĉirkaŭ puto; la blua ĉielo, kiun mi ĉiam povis vidi el mia fenestro; voĉoj, diversaj bruetoj kaj frapetoj en la koridoro; fine, la komence nerimarkebla, sed poste okulvidebla vivo interne de la kamero — la vivo de araneo-ĉasisto aŭ eĉ okaza kviko de museto, — kiom ĉio ĉi estas interesa, diversspeca kaj senfine komplika! . . .

Mia kamero lokiĝis en la dua etaĝo, kaj mia fenestro ne havis kutiman ŝildaforman ŝirmilon. Tial mi povis vidi transe de la ĉirkaŭmuro, en la granda ĝardeno, la promenantajn frenezulojn — du fojojn ĉiutage. Iufoje iliaj krioj atingadis min. Tio estis homoj, ne komprenataj de la plimulto, vagantaj laŭ la blankaj vojetoj de la senfolia ĝardeno, mansvingante kaj revante pri io . . . Eble, inter tiuj malsanuloj sin trovis veraj senprudentuloj, sciantaj ion pli, "ol en la lernejoj instruas filozofoj." (1)

Mi vivis kiel meditante, ensorĉita de senlaŭteco. Al mi plaĉis mia malliberejo . . . Min malkvietigis sole la senĉesaj frapetadoj . . . Komence miaj najbaroj petis pardonon pro maltrankviligo: ili bezonis interkonsenti pri respondoj, donotaj ĉe esplordemandado. Mi transdonadis ĉion ekzakte kaj senproteste, konsciante la gravecon de la komisiataj al mi aferoj. Poste ili elpensis ĉiam novajn kaj novajn temojn por interparolado. Ĉu mi rajtis eviti tian peradon? Mi fariĝis nevola atestanto de geedza feliĉo. Miaj najbaroj — studento kaj studentino — estis enamiĝintaj, kaj apenaŭ duonjaro forpasis de ilia geedziĝo . . . Videble, ili baldaŭ forgesis pri mia ekzisto: al ili ŝajnis, ke ili interparolas senpere. Laŭ ilia permeso, mi ĉesis aldoni la frazojn: "via edzo diras tion kaj tion", aŭ: "via edzino komisiis al mi transdoni, ke . . ."

Mi transdonadis per frapetoj, sen iaj avertoj, ĉion, kion oni al mi frapetis, jen el-dekstre, jen el-maldekstre . . .

— Ĉu vi memoras, karulo, nian promenon en la urba parko?

— Certe, mi memoras. Ho, kiom mi volus alpremi viajn fingretojn al miaj lipoj.

— La malbenitaj ĝendarmoj legas nun viajn leterojn.

Ha, mi volas vidi vin . . . mi volas, mi volas . . .

Ĝi estis tuta mondo da rememoroj, aludoj kaj amvortoj, meze de kiuj mi vagadis, flanka kaj fremda . . .

Sed unu fojon mi ekvidis, fine, tiun nevidatulinon, kun kiu mi tiel ofte interparolis, kaj tio igis min ŝanĝi mian rilaton al ŝi. La 24-an de decembro matene, revenante de mia ĉiutaga promeno, mi renkontis mian najbarinon, kiun oni, pro eraro, elirigis el ŝia kamero antaŭ, ol mi estis enŝlosita en la mia. La najbarino ekridetis al mi kaj faris kapsignon. Ŝi estis juna blonda virino, similanta virgulinon, kun rektoliniaj kapricaj brovoj, malsekaj helaj okuloj, ruĝa, volupta kaj ĉarma buŝo.

Tiun vesperon mi kun plia entuziasmo frapetis la dolĉajn frazojn, kiujn al mi komisiis ŝia edzo. Kaj mi devas konfesi, ke mi kelkafoje permesis al mi transdoni ilin per miaj propraj esprimoj. Tamen mi estas certa, ke mia parolmaniero ne faris ilin malpli konvinkigaj. Kiam mia najbarino respondis al mi ame kaj pasie, mi ne rapidis transdoni ŝiajn parolojn laŭ destinita adreso, ĉar tiumomente mi sentis, ke ŝia koro kvazaŭ apartenus ne sole al li, sed ankaŭ al mi . . .

Tiel strange mi estis enamiĝinta tiun antaŭkristnaskan vesperon de la milnaŭcent-dua jaro.

El la rusa tradukis D-ro Andreo Fiŝer, L. K. (Tiflis).

## Akcesorajo

Ermito vivis en arbaro, kaj la bestoj ne timis lin. La homo interparoladis kun la bestoj kaj ili bone komprenis unu la alian.

Foje la ermito ekuŝis sub arbo; korvo, kolombo, cervo kaj serpento venis dum la nokto en saman lokon. La bestoj komencis diskuti, de kio dependas la malbono en la mondo. La korvo diris: »La malbono dependas de la malsato. Kiam vi satmanĝis, vi sidiĝas sur seka branĉo-ĉio estas gaja, bona, vi ĝojas pro ĉio; sed se vi malsatis unu, du tagojn, ĉio ŝajnas abomena, vi preferus ne vidi la Dian mondon. Senĉese io vin tiras ien, vi flugas de unu loko al alia, senĉese vi estas maltrankvila. Kaj kiam vi ekvidas viandon, vi forgesas pri ĉio, vi vin ĵetas sur ĝin, atentis nenion. Iufoje oni ĵetas sur vin bastonojn, ŝtonojn; lupoj, hundoj kaptas vin, vi tamen ne ellasas la pecon. Kiom da ni pereas tiamaniere de malsato. La tuta malbono dependas de la malsato.«

La kolombo diris: »Laŭ mia opinio, ne de la malsato dependas la malbono, sed de la amo. Se ni vivus unuope, ni ne konus la malĝojon: por unu mizero ne estas sur la tero; sed ni ĉiam vivas pare. Kaj kiam vi ekamis, vi neniam ĝuas trankvilon; ĉiam vi pensas pri la kunulino: ĉu ŝi estas sata, ĉu estas al ŝi varme? Kaj kiam ŝi ien forflugas, vi estas tute malfeliĉa; senĉese vi timas, ke akcipitro aŭ homoj kaptos ŝin; fine vi mem flugas serĉi sin kaj pereas, aŭ en la ungegoj de akcipitro, aŭ en kaptilo. Kaj se la amikino perdiĝis, ĉio fariĝas teda por vi: vi ne manĝas, ne trinkas, vi nur serĉas kaj ploras. Kiom da ni pereas tiamaniere, La tuta malbono dependas de l' amo.«

La serpento diris: »Ne, la malbono dependas nek de l'malsato, nek de l'amo, sed de l'kolero. Se ni vivas kviete kaj ne koleras, ĉio estas bona. Sed se io malplaĉas al ni, ni ekkoleras, kaj ĉio fariĝas malagrabra por ni. Ni forgesas pri ĉio, nur siblas, rampas, serĉas, kiun ekmordi. Ni indulgas neniun nek patron, nek patrinon, oni mortmordus, ŝajnas, sin mem. Kaj oni koleras tiel longe, ĝis oni sin pereigas. La tuta malbono en la mondo dependas de l'kolero.«

La cervo diris: »Nek de l'kolero, nek de l'amo, nek de la malsato dependas la malbono en la mondo, sed de l'timo. Se oni povus ne timi, ĉio estus bona. Ni havas rapidajn piedojn kaj sufiĉe da fortoj. Kontraŭ malgranda besto ni povas nin defendi per la kornoj, kaj de l'granda ni povas forkuri. Sed ne eble estas ne timi. Se branĉeto ekkrakas en la arbaro aŭ la folioj ekmurmuretas, oni tuj tremas de l'timo. Iufoje leporo preterkuras, flirtas birdo, aŭ seka branĉeto defalas: oni pensas, ke tio estas sovaĝa besto, forgalopas kaj efektive renkontas rabobeston. Aŭ oni forkuras de hundo kaj renkontas homon. Ofte ek-timinte oni kuras Dio scias kien, falas kaj rompas la kolon. Ni dormas unuokule senĉese aŭskultas kaj timas. Neniun ni ĝuas trankvilon. La tuta malbono dependas de l'timo.«

El »Abocolibro« de L. Tolŝtoj.



(1) Hamleto, akto unua, sceno kvina. — (Rim. de la trad.).

# Kion ne komprenas la Hirundoj kaj Papilioj

de WIKTOR GOMULICKI

Foje ni foriris de nia muelejo tiel malproksimen, ke la bruo de ĝiaj radoj ĉesis nin atingi.

Anjo deŝiris kampajn florojn por bukedo kaj ju pli malproksimen ni iris, des pli belajn kaj multenombrajn florojn ŝi trovis.

Kolektante do blujajn cejanojn ni foriris kelke da versoj kaj tute ne rimarkis, kiel kaj kiam ĝi okazis.

Cetere jam de longe ni ĉesis kalkuli la horojn kaj zorgi pri ili. Niaj horloĝoj kuŝis jam de unu monato sur la fundo de nia komodo.

Kiu dum amkunveno observas la horloĝajn montrilojn? Kiu, ricevante tiom da karesoj de l'naturto, tedas ĝin kalkulante la tempon per egalaj kaj etaj partumoj?

La suno brilis sur la ĉielo tuj antaŭ ni, — ŝajnis do al ni, ke paŝante ni iras al la suno.

Subite inter la herbejoj, delikate ondantaj, sur kiuj staris garde izolaj kampaj pizarboj, aperis super ni monteto kun malgranda aro da pinoj.

La pinaro estis malsanema; kaj maldensa; tra ĝi oni povis vidi tute klare flavajn murojn kaj ruĝan tegmenton de vilaĝa domo.

La flave-ruĝa domo ekinteresis nin; ni do eniris inter la pinojn, kvankam ili tute ne estis allogaj.

Ekzistas arboj, same kiel homoj, kiuj mallogas de l'unua rigardo.

La teron inter la pinoj ne kovris eĉ unu trunketo de herbo. Se ĝi iam kreskis tie, oni videble detruis ĝin per paŝado. Ĉe la bazo de l'trunkoj vane oni serĉus junajn kreskaĵojn, kiuj ordinare akompanas la maljunajn arbojn.

Tio estis vegetato sen estonteco, kiel ekzistas vivoj sen morgaŭo.

Preterpasinte la malĝojajn pinojn ni ekvidis antaŭ ni grandan domon, sur kies muroj rampis sovaĝaj vinberujoj. Al unu el la muroj estis apogita laŭbo el bastonoj kun-

plektitaj de konvolvuloj kaj pizoj. Post la domo estis ĝardeno, nezorgada kaj plena de loloj.

Plej granda kaj ŝajne plej grava parto de l'konstruaĵoj estis ekstreme longaj staloj, starantaj ĉe ambaŭ flankoj de l'domo kaj kvazaŭ formantaj kun ĝi nedivideblan tuton.

Iom pli malproksime kuŝis flava grenkampo. Malalta barilo apartigis ĝin de l'konstruaĵoj kaj de l'malgranda placeto antaŭ ili.

La barilo formis angulon kaj en la loko, kie kuniĝis du ĝiaj oblikvaj duonoj, ĝi havis pordegon, altan, larĝan kaj en tiu momento tute malfermitan.

Ni proksimiĝis al la malalta barilo. Anjo ne havis ankoraŭ sufiĉe da tempo por apogi al ĝi sian ombrelon kaj jam en la flava domo oni malfermis la pordon kaj viro stariĝis ĉe la sojlo kaj laŭte demandis:


— Ĉu vi iras eksterlandon?

Ni komprenis. La barilo, malzorge konstruita el kurbaj bastonoj, estis io pli grava, ol limo de kampara proprajo . . .

Ĉi tiu barilo apartigis du naciojn, du landojn, du civilizaciojn.

La sekalo, kreskanta post ĝi, estis jam germana sekalo; la cejanoj, kiuj, kiel bluj lumetoj, bruletis inter la spikoj, estis jam germanaj cejanoj.

Germana estis eĉ la vento, fluganta de tie kune kun la mielaodoro de l'konvolvuloj . . .



Landlimo

Kompreneble, Anjo devis rifuzi al si la riĉigon de sia bukedo per germanaj floroj kaj ŝi tuj sciigis pri tio la laŭte demandantan viron.

Li reiris domon trankviliĝinta, sed sendube dek kelkaj paroĵ da viglaj, kvankam nevideblaj okuloj observis ĉiujn niĝajn movojn.

Kun stranga sento ni komencis rigardi ĉirkaŭe. — Kial? — demandis Anjo, larĝe malfermante la okulojn — sekve la spiko, kiu elkreskis tie ĉi el grajno, alportita de tie de la vento, estas nia, sed milionoj da aliaj spikoj, ĝiaj frat-oj, estas fremdaj nur tial, ke ili kreskas unu paŝon pli malproksime?

Mi penis klarigi al ŝi, ke tio ĉi estas tute natura, eĉ necesega.

— Por kiu?

Anstataŭ respondo mi levis la ŝultrojn.

Okupataj per la penso pri la divido, ni turnis la okulojn al la ĉielo, serĉante ankaŭ sur ĝi liman linion.

Sed la ĉielo estis nur unu, nedividita.

Ni rigardis la sunon.

Ankaŭ la suno estis nur unu, nedividita.

En la sama momento papilio, kiu sidis proksime de ni sur la barilo kaj jen etendis, jen altiris siajn ruĝajn flugiletojn kun argenta subaĵo, rapide leviĝis kaj transflugis al la germana flanko.

Ĝi longe flirtis tie super la balanciĝantaj spikoj kaj trovinte amikon aŭ amikinon ankoraŭ pli trankvile revenis.

Samtempe kelke da hirundoj antaŭsentante proksimiĝon de fulmotondro, komencis kun laŭta pepado rondflugi malproksimen kaj senpune trans la limon . . .

— Vi vidas! — ekkriis Anjo kun infana triumfo. — La hirundo kaj papilioj ne konsentas la »necesecon«, pri kiu vi tiel saĝe parolis.

Ĉi tiuj senkonsideraj vortoj malĵojigis min. — Ah, Anjo, Anjo! — diris mi riproĉe, — ĉu vi forgesis, ke la homo estas pli saĝa kreitaĵo, ol la flirtemaj birdoj kaj papilioj senpripensaj? . . .

*El »Pola Antologio«.*

*Novelaro elektita kaj tradukita de KABE*

## „La lasta volo de l' papo Benedikt XV.“

Jena superskribo trudante prezentiĝis grandlitere en burĝa gazeto. Imagante ke la lasta antaŭmorta deziro de tia eminentulo devas esti tre grava, mi scivolege studis la detalon de la sciigo. Kion mi eksciis? La papo mortinta estis vera zorganto. Sed, ĉu vi eble konjektas, ke lia „lasta volo“ prezentis la deziron por la interfratiĝo de l' popoloj aŭ almenaŭ de l' diversnaciaj katolikoj intermilitintaj, aŭ por la helpo al la malsatantaj rusoj? Ho, vi tre erarus! La „sankta papo“ zorgeme ordonis, ke *sia kadavro estu vestota* per la plej pompaj vestaĵoj (Pontifikvestaĵoj) kaj ke la *kadavro estu prezentota* dum 3 horoj en la „luksa salono“ kaj poste dum 2 tagoj en la „Petropreĝejo.“

Ĉu post ekscio de ĉi tia fakto prudenta homo ankoraŭ dubas pri la homarana zorgemeco de l'estinta papo?

*Dubapito.*

## En la riverhaveno

de V. G. KOROLENKO<sup>(1)</sup>

Ni alvenis la riverhavenon je la unua horo nokte. Ĝis la ekveturo de l' vaporŝipo restas longa tempo. Malsupre, malproksime trembrilas fajreto super la flava terkavo. Tie iras „Okà“<sup>(2)</sup>. Nia vaporŝipo „Udaĉnij“<sup>(3)</sup> donos la voĉon je sep verstoj de ĉi-tie, en Varej'o<sup>(4)</sup>. La kajuto estas okupita plenplene. Sur la benkoj estas metitaj pakajoj kaj sakoj. Nigra hebreo, kiun mi lunde vidis ĉe l' akaparo, nun dormas, sin apogante je sakoj, sur la benko. Mi lok-iĝas ekstere, sur la ferdeko. Supre delikata freŝa vento blovas, dum la noktoj. Antaŭ la okuloj, post la havenlimo sterniĝas la rivero. Estas ia aparteco en ĝia iomete heliĝanta ebenajo. Estas sentata nokta kurado, movado, nevidebla por la okuloj, kaj la malproksima bordo iom briletas, miksiĝante kun la grizetblua nokta malproksimaĵo. La Malgranda Ursino<sup>(5)</sup> pendis ĝuste super la mezo de l' rivero, kaj ĝia respegulaĵo jen estas iomete etendita de nevidata kuranta ondo, jen tute malaperas. Mi eniĝas dormeton, el kiu mi estas eligata per mallaŭta interparolo.

Virino kaj alia viro aŭskultas.

— Kiaj radoj! Ĝi estas ondo, kiu plaŭdas de l' ŝipnazo. Ili transiras al la ŝipnazo kaj klinas la kapojn.

— Ne-e, diras la virino. Ĝi estas bareletoj, lasitaj sur la akvon; Ili bruas.

— Muelilo tion faras, je kvar verstoj de ĉi-tie. Por miaj piedoj estas tre malvarme. Mi leviĝas kaj iras tien kaj reen laŭ la ferdeko. La vaporŝipo el malsupro de la terkavo estas pli proksima. Eliĝas reliefe tri fajretoj, sed ili kvazaŭ estas senmovaj. Sur la akvo pasas apenaŭ rimarkeblaj strietoj. La ĉielo super la horizonto heliĝis, kaj el ie falas sur la riveron ruĝetaj kaj verdetaj apenaŭ rimarkataj rebriloj.

— Aŭskultu, voĉon ĝi donas . . .

Inter la publiko estas movado. Poste — silento. El supre, kie la rivero iom briletas je blua kurbaĵo el post la monto, ĝisportiĝas malproksima fajfo, tielsame malklara, kiel tiuj ĉi ruĝetaj rebriloj sur la rivera glataĵo.

— Nun, jam baldaŭ.

Dume la elmalsupra vaporŝipo ankaŭ eliĝas tie, kie estas la malhela strio de l' apudborda terkavo, kaj, iel subite elveturinta sur la helan supraĵon, ĝi pligrandiĝas, fajre streĉiĝante kaj forkaptante dum ĉiu radfrapo grandegan spacon.

— Gardu vin, ĝi frapos per la „balancilo“.

(1) La 25<sup>an</sup> de Decembro 1921 en u. Poltava (Rusio) mortis tiu fama popola verkisto. Li tre favore rilatis al la esp.a movado. Kelkaj el liaj verkoj jam estas tradukitaj kaj presitaj en esp.o. Inter tiuj: „La Senlingvulo“ kaj „Arbaro Bruas“.

La ĉi-apudan fragmenton ni tiris el „Esperanta Krestomatio“ de M. S. Valentinov.

(2) kaj (3) Nomoj de vaporŝipoj.

(4) Geografia nomo.

(5) Konstelacio.

Ondo balancas nian havenaĵojn, preterpasas fenestrojn, en kiuj aperas kaj malaperas dormantaj kajutaj pasaĝeroj, knaras najbara malgranda havenaĵo, io krakas, frapas, la radoj brubatas reenire. Boateto pendante en l' aero, eliĝas, kiel malhela akra silueto super linio kontraŭ la bordo kaj kliniĝas al la ŝipnazo.

Post minuto jam bruas sur la pontetoj la pezaj paŝoj de ŝargistoj. Brufalas sur la plankon sakoj; la kokoj en kaĝoj apud la vaporŝipa kuirejo raŭke krias, brue frapante per la flugiloj . . .

La rivero heliĝas, la Ursino estingiĝas supre, kaj la kupoloj de l' preĝejo sur Paŭlaj montoj similas al fantaziaj globetoj, al rozario, sur la hela ĉielo, sur kiu ekflamas la matenuĝo.

Harkovo (Ukrajnio)  
Novembron 1918

Kun la permezo de l' aŭtoro  
esperantigis ZILBERFARB

## Aforismoj

*Trompaĝemo estas naturdevena ĉe la virino, ĉe la plej sagaca kiel ĉe la plej stulta. Estas por ŝi tute nature ties uzi ĉiuokaze kiel por besto atakata tuj sin defendi per siaj naturaj armiloj; kaj tiel agante, ŝi, ĝis certa grado, konscias pri siaj rajtoj; kio okazigas, ke estas preskaŭ neeble renkonti virinon absolute verema kaj sincera.*

Schopenhauer

*Indiferenteco estas natura inter la viroj: pro naturo, regas inter virinoj malamikeco.*

Schopenhauer

*La edziĝo estas kaptilo, kiun la naturo insidas al ni.*

Schopenhauer

*Okazas pri vera amo, kiel pri apero de fantomoj: Ĉiu parolas pri ĝi, sed malmultaj vidis ĝin.*

La Rochefoucauld

*Ne estas multaj personoj, kiuj ne hontas esti sin amintaj; kiam ili ne plu sin amas unu la alian.*

La Rochefoucauld

*Ĉiuj pasioj igas nin fari mallertaĵojn, sed plej ridindajn igas nin fari la amo.*

La Rochefoucauld

*Estas malmulte da virinoj, kies la merito daŭras pli longe ol la beleco.*

La Rochefoucauld

*Ŝajnigi amon, kiun oni ne sentas, estas ĉiam mortiga peko; malkonfesi amon, kiun oni sentas, povas esti laŭcirkonstanco mortiga peko aŭ heroaĵo.*

P. Mantegazza

*Kie estas vera amo ne povas esti neĉasteco; kie mankas amo, eĉ kiso estas neestetika.*

P. Mantegazza

*La puna kodo de ĉiuj civilizitaj nacioj konas multe da krimoj, deliktoj (leĝodekliniĝoj) malobeoj kaj sennombraj punoj; la kodo de l' amo nur unu krimon: la mensogo, kaj nur unu punon: la morto.*

P. Mantegazza

Mendu viajn librojn ĉe nia librejo (petu katalogon)

## Sciind- kaj notindaĵoj

**Akademio.** „Pro troa laborado, kiel redaktoro de grava Gazeto pri senfadena telegrafio, kaj ankaŭ tre senkuragiĝita de la reformemo ĉe kelkaj, kiu, sur ŝanceblebla fundamento, malebligis ĉian firman konstruaĵon, *Dro. Piere Corret* rezignis en la Akademio la direktorecon de la sekcio por la scienca kaj teknika Vortaro.“

Per unuvoĉa decido la Akademio elektis S<sup>ron</sup> *Rollet de l' Isle* por anstataŭi la eksiginton. Kiel sekretarion S<sup>ro</sup> *Rollet de l' Isle* elektis S<sup>ron</sup> C. Rousseau al kiu oni estas petata sendi ĉiujn dokumentojn. Adreso: 4. Place de la République, Levallois-Perret (Seine) Francio.

S<sup>ro</sup> Corrett eksigis el la Fako por kiu li estis promesinta labori, sed tamen restas akademiano. Li forlasas la laboron, sed konservas la honorigon.

Okazis en Berlin internacia Kongreso de anarkiistoj. En raporto publikita en la gazeto «Le Libertaire» (n<sup>o</sup> 157) ni legas la jenon:

„*Plej varme ni devas danki nian Kdon Souchy, kiu plenumis la tropezigan taskon traduki ĉiujn paroladojn, sed la laboro vere estis tro peza por li. Estas bedaŭrinde, ke la organizintoj ne dungis kelkajn interpretistojn por fari tiun nepre-bezonan laboron.*“

\* \* \*

La ĉeĥoslovaka ministerio de instruado per edikto n<sup>o</sup> 791—21, 15 sept. 1921 decidis: „Anstataŭe la fakultativa instruado de *esp.o* la administracioj de la „neŝtataj komercaj akademioj“ aŭ la direktoj de „ŝtataj komercaj akademioj“ rajtas enkonduki la fakultativan instruadon de *ido*, se troviĝas taŭga instruonto kaj se montriĝos, ke la lernantoj preferus lerni *idon*. Pri la instruado de *ido* estas validaj la kondiĉoj donitaj por *esp.o* en la edikto n<sup>o</sup> 34000, 7 majo 1921“ (Vestnik 1921 pĝo. 209).

## Notetoj el Britio

*Laŭ oficialaj statistikoj dum 1921 la ĉiu semajnaj salajroj de 7 000 000 laboristoj estis malpliigitaj je L. 6 000 000. Spite tio 2 000 000 ne povas trovi okupon. Iumaniere sukcesis la atako de la kapitalistoj kontraŭ la „militvenkintoj“. La salajroj en multaj industrioj malaltiĝis ĝis la nivelo 1914-a. Sed la kosto de vivrimedoj (denove laŭ oficialaj ciferoj) ankoraŭ estas 92% pli alta ol tiam.*

*La publika krio nun estas: „Sparu en la ŝtataj elspezoj“. Kompreneble ne estos malgrandigo de la militkostoj sed de la edukado kaj en la subteno de la senokupaj laboristoj.*

*Nuntempe estas multaj atakoj kontraŭ la Laborista Partio. La nuntempaj ŝtatestroj timas la vekigantan potencon.*

*La Daily Herald (Ĝiutaga Heroldo) mia sola ĉiutaga jurnalo laborista eldonis frazaron pri la venonta Kongreso de la B.E.A. Pro la malaltigo de ĝia prezo al 1 penco. Ĝia legantaro pligrandiĝas.*

Mark Star



## Wang Ngan Chen

Leginte en la grava gazeto burĝa «Le Temps» (La Tempo) recenzon pri studo aperinta en «Revue de France» (Revuo de Francio) ni ne dubis eĉ unu momenton pri la malvereco de la asertoj de l' verkinto. Li estas skribinta, ke, longtempe antaŭ la *Bolŝevismo*, iu ĉina reformisto volis starigi komunismon kaj kondukis la popolon al . . . malsatego kaj mizero. —

Ĉar ni havas la bonŝancon kaj plezuron havi en *Satanio* ĉinajn kamaradojn, ni volis, unu fojon pli, ŝperti pri la burĝa mensogemo ĵurnalista. Ni do petis klarigojn al nia k<sup>do</sup> Sinpak, kiu afable bonvolis sendi la ĉi-suban historian raporteton. Ĉu nia legantaro ne juĝos kiel ni, ke tiele oni trafte utiligas esp.on, profite al la Vero kaj al nia komuna klerigado. — Red.

*Wang Ngan Chen* estis ministro de la imperiestro *Chen Tsoung* (1067—1085) dum la dinastio *Shong*; kaj liaj politikaj reformoj estas tre famaj en la ĉina historio. Li diris: “La financoj iom post iom malprosperas kaj la ŝtato malboniĝas. Ĉar oni ne sciis imiti la sistemon de la antikvaj imperiestroj; se ni imitos tiun sistemon, nia reformo ne timigos la popolon. Sukcesigi la politikon de la antikvaj imperiestroj ne estas malfacile: Ni uzu pli bone ĉiujn fortojn de la popolo por produkti la vivbezonaĵojn, kaj la ŝtato pliriĉiĝos. La fiancoj de antikvaj ŝtatoj ne mankis ĉar tiuj havis bonan metodon por fari monon.” Jen estas la principo de la politikaj reformoj de Wang Ngan Chen.

Li estis ministro dum la jaroj 1069—1074, malgraŭ multaj kontraŭdiroj de aliaj ministroj; sed lin favoris la imperiestro, kaj tre aprobas lian planon de politikaj reformoj.

En 1069 li konstatas ke la popolo ĉiam pagas la saman imposton ĉiujare ĉu la jaro estas bonrikolta aŭ malbonrikolta; tio nur donas profiton al la riĉaj komercistoj, ĉar ili povas aĉeti la komercaĵojn je malalta kosto dum la bonrikolta jaro, kaj kare vendi ilin dum malbonrikolta. Tial la ŝtato mem aĉetu ĉion, kiam la produktaĵoj malkariĝos, kaj revendu kiam la produktaĵoj pli kariĝos.

Pli poste li proklamis ke ĉiuj popoloj devas pagi la impostojn laŭ la produktado de la kampoj, t.e. se la kampo produktis pli multe, la mastro de la kampo devas plimulte pagi.

En la sama jaro li proklamis ankaŭ: la ŝtato prunte donu monon al la popolo, se la tiun-ĉi bezonas. La popolo redonos la monon kun dudek procentojn post la rikolto dum somero kaj vintro. Ĉiu ŝuldanto devas serĉi dek homojn kiel garantiantojn. Se, okaze de malbonrikolta jaro, la popolo povas repagi nur pli malfrue, pro tio la riĉuloj ne povas postuli duoblan procenton de la malriĉuloj kiel antaŭe. Ĉiuj produktaĵoj estu kolektitaj en la ŝtatajn provizejojn. Oni vendu ilin tiam, kiam ĉio plikostiĝos. En ĉiu distrikto ekzistu ŝtaticisto por administri tiun aferon.

1070 — Por ŝpari monon, li proklamis: la militservo estu devigo por ĉiuj (antaŭe la ŝtato devis dungi kaj pagi la soldatojn. Por anstataŭi la militservon, oni povis pagi monsumon proporcie laŭ sia riĉeco). Por rifuzi la devigan servon la popolo forkuris ĉien. Ĉar pro militservo la popolo ne havis tempon por labori kaj plugi, aŭ se ĝi volis

pagi la monon la malriĉa popolo estis devigata vendi bovojn aŭ kampojn.

De la jaro 1073 ĝis 1074 la vetero estis tute senpluva; pro tio la imperiestro malĝojante diris: “tio estas la rezulto de mia kruela politiko, Dio ni punas.” Li volis forigi kelkajn sistemojn, kiuj malhelpis kaj maltrankviligis la popolon, kvankam Wang Ngan Chen diris: “Sen pluva vetero ofte okazis antaŭe, tio tute ne rilatas al nia politiko.”

Pro la senrikolteco kaj la granda imposto la popolo estis tre suferanta, mizera, senvesta, malĝoja, malsana kaj malsata. Oni vendis ĉion sur la strato por pagi la ŝuldojn kaj impostojn al la Registaro.

La kompatulo Chin Jap pentris kion li vidis ĉe la popolo kaj sendis la bildon kun klarigo al la imperiestro. Kiam la imperiestro vidis la bildon, eksciinte la kruelan politikon kiu suferigas la popolon. Li tuj ĉesigis ĝin kaj eksigis la ministron Wang Ngan Chen.

Kiel oni povas konstati. Wang Ngan Chen ne faris komunismajn reformojn. Li celis nur riĉigi la ŝtaton, kaj pro tio suferigis la popolon.

En la sama tempo, ĉina historiisto *Su Ma Kan* diris: „La popolo malriĉiĝas kiam la registaroj riĉiĝos, tial ke ĉiuj surteraj produktaĵoj kiuj ne apartenas al la popolo, certe apartenas al la registaro.“

Grava kaj prava kritiko!

*Sinpak.*

## Atentu pri la adresoj!

Ĉion rilatan al la *Redakcio* oni adresu jene: *Sennacieca Revuo*, 24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI.

Ĉion rilatan al *Administracio*: L. Glodeau, 177, rue de Bagnolet, Paris XX.

Ĉion rilatan al S. A. T.: *Sennacieca Asocio Tutmonda*, 23, rue Boyer, Paris XX.

Kiam oni bezonas sciigi ion samtempe al 2 aŭ al 3 fakoj, oni povas enfermi la leterojn en unu sola koverto, sed tiaokaze oni uzu apartan paperfolion por ĉiu fako. Tio tree faciligos la laboron nian. — Kvankam la gazeto estos presata en *Leipzig*, la *Administracio* estas ankoraŭ en Paris; sekve nenion sendu al *Leipzig*.





## La Angulo de l' Poetoj

### LA FONTO

AL CHARLES BAUDOUIN

Kial mi estas bona? Kial doloriĝas  
 La indulgo kaj kial ĝi fariĝas  
 Ĝojo donante?  
 Kial venenumas la koron, se mi  
 Doni ne povas?  
 Kial ventegumas mian animon  
 La manka vestaĵo kaj  
 La manka animo?  
 Kial mi dezirus havi milionon  
 Da koroj, da animoj  
 Kiam ĉi-mia sola  
 Signifas por mi nur malĝojon, suferon?  
 Kial ne laciĝas  
 Miaj donemaj brakoj?  
 Kaj kial ĉirkaŭprenas  
 Ili la mondon plenan  
 Je ĉiaj malbon' kaj abomeno?

Gutoj de boneco falas, faladas  
 De supre kun forto kiu povas trabori  
 La ŝlimon de l' tero ĝin plenkovrantan.  
 Malsupre en sekretaj, profundegaj lagoj  
 Iom post iom kolektiĝas la gutoj.  
 Kolektiĝadas kaj ŝvelegiĝinte  
 Eksupreniĝadas per forto ŝtonrompa.  
 Per fort' malbenrompa  
 Por ke la homo apud ĝi genuflekse  
 Povu ĉerpi el ĝi pro la soifego  
 Kaj por lavi sian larmkovritan vizaĝon.

de Aladár Bán

### LA LABORISTOJ

(El angla tradukis D. A. KLAĜIN)

Ŝtonlabore jam manoj rompiĝis  
 Kaj je ŝtal' rompiĝis mia fort'  
 Ŝvitante mi jarojn laboradis  
 Por via plezuro kaj bonsort'!  
 Kioman salajron vi pagis,  
 Vi estro kaj sklavkunpelant' ?  
 Sufiĉe ke vi min malsate  
 Revenigu laborpetant'.

Al vi mian virecon mi donis,  
 La ĝojecon, junecon kun ĝi,  
 Vi uzis min, rompis, mokadis,  
 Senkore ignoris min ja vi,

Malrajtis sunlumon eĉ ĝui  
 Kaj spiri en freŝa aer',  
 Loĝigis en lokoj malpuraj  
 Min juĝis je zorg' kaj karcer'.

La faritajn belajojn mi kreis  
 Por vi tut' la rabaj' kaj la glor'  
 Vi malbonigis miajn gefilojn  
 Repremis min vipe al labor'  
 Pacience mi nun suferas  
 Konsci' ĉar vekigis en mi:  
 Ke iun ajn tagon, la mondon  
 La laboristoj venkos por si.

### MARŜO

## DE L' LABORISTOJ-ESPERANTISTOJ

(Laŭ melodio: "Smjelo, tovariŝci, v nogu")

Fratoj. antaŭen sen timo  
 Post kondukanta nin stel'  
 Kun la esper. en animo  
 Al forloganta nin cel' !  
 Estas ne longa la vojo,  
 Kiu nun restas por ni:  
 Baldaŭ ni vidos kun ĝojo  
 Morton de la tirani' !  
 Ni suferadis sufiĉe,  
 Sed nun finiĝis sufer',  
 Kaj devas vivi feliĉe  
 Ni, posedantoj de l' ter' !  
 Estas ni ĉiuj popolo  
 De l' sama lando-patrin',  
 Kaj sama celo kaj volo  
 Nun unuigas ja nin!

\* \* \*

Ĉiuj ni volis liberon  
 Por la proletariar'  
 Kaj liberigi la teron  
 De la burĝaro kaj car' !  
 Kaj plenumiĝis la volo  
 De la proletariar' :  
 Reĝas de nun la popolo  
 Kaj malaperis la car' !  
 Ĉie la burĝ-plutokratoj  
 Estas en la agon',  
 Kaj alilande la fratoj  
 Manojn etendas al ni!  
 Marŝu do, fratoj sen timo  
 Post kondukanta nin stel'  
 Kun la esper' en animo  
 Al forloganta nin cel' !

Petrogrado, la 1-an de Junio 1921

V. N. DEVJATNIN

## 2<sup>a</sup> Kongreso de S. A. T.

Frankfurt a. Main (Germanio)

12—16 aŭgusto 1922

2<sup>a</sup> Komuniko.

*Kongreskomitato.* La Frankfurt' aj S. A. T. anoj kunvenintaj dimanĉon 15 januaro, elektis la jenan Komitaton, kies tasko estas zorgi pri ĉio rilata al la 2<sup>a</sup> Kongreso:

Prezidanto: K<sup>do</sup> *Jean Roth*, Rodelheimer Landstr. 131 III,  
*Frankfurt a. M. Rodelh.*

Sekretario: K<sup>do</sup> *Heinrich Ahl*, Schwalbacherstr. 64 I,  
*Frankfurt a. M.*

Kasisto: K<sup>do</sup> *Rudolf Mayer*, Rodelheimer Landstr. 24 II,  
*Frankfurt a. M.-West.*

Priloĝeja fako: { K<sup>do</sup> *Heinrich Frickard*, Nauheimer Str. 2 I,  
ĉe Werner, *Frankfurt a. M.-West.*  
K<sup>do</sup> *Ludwig Puff*, Josbacherstr. 20 ptr.,  
*Frankfurt a. M.*  
K<sup>do</sup> *Heinrich Kempf*, Rohrbachstr. 54, Hh. II,  
*Frankfurt a. M.*

\*

*Kongresejo.* La Kongreso okazos de 12 ĝis 16 aŭgusto (samtempe kun la Internacia Sindikata Kongreso de la Ministroj) en la festhalo de la fama restoracio „Frankfurter Konzertgarten, Allerheiligen Tor, Ecke Lance Strasse“, meze de la urbo.

*Kongreskotizo.* Anglio, 3 ŝil. — Aŭstrio, 100 kr. — Belgio kaj Francio, 7 fr. — Bulgario kaj Rumanio, 20 lev. — Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 20 kr. — Danio, Norvegio kaj Svedio, 3<sup>1</sup>/<sub>2</sub> kr. — Germanio kaj Finnlando, 20 mk. — Hispanio, 4 pes. — Hungario, 50 kr. — Italio, 9 lir. — Nederlando, 2 guld. — Polio, 200 mk. — Svisio, 3,50 fr. sv. — Usono, 80 cend.

Sur tiu tabelo, ĉiuj ciferoj estas en sama proporcio rilate al la horsalajro respektiva de ĉiu lando.

*Adreso:* Sendu ĉion (aliĝilon kaj monon) al K<sup>do</sup> Jean Roth, Rodelheimer Landstr. 131 III, *Frankfurt a. M.-Rodelh.* (Germ.)

*Pago:* per naciaj monbiletoj aŭ ĉeko en registritaj leteroj. La germanianoj preferu ĝiri sian kotizon en la konton de la kongreskasisto, nome „Girokonto N<sup>o</sup> 337 Frankfurter Sparkasse“.

*Aliĝoj:* Valoraĵ estos nur la aliĝiloj akompanataj de la kotizo. La aliĝilon tekstu legeble kaj laŭ la jena ordo: 1. familia nomo, 2. nometo, 3. profesio, 4. strato kaj N<sup>o</sup>, 5. urbo, 6. lando. — Ankaŭ aldonu la numeron de via S. A. T. a membrokarto.

*Kongresaj Eldonaĵoj:* Interŝanĝe de la kotizo, ĉiu aliĝinto ricevos unu specialan insignon, unu kongreskarton numeritan, kaj ĉiujn eventualajn kongresdokumentojn (gvidlibreto tra Frankfurt, programo de la debatoj, k. t. p.).

*Loĝigo:* La aliĝontoj sciigu ĉu ili deziras hotelan aŭ privatan ĉambron, kaj kiom da familianoj ilin akompanos.

*Komunikoj:* Ĉiu N<sup>o</sup> de *Sennacieca Revuo* publikigos unu komunikon de la Kongreskomitato.

Pli poste ni raportos detale pri la vivkostoj en Frankfurt, pri la surfervoja alveturado al Frankfurt de kelkaj eŭropaj urboj. Ankaŭ ni pristudas la laborplanon kaj la regularon de niaj kunsidoj (delegitoj, mandatoj, izoluloj, voĉdonrajto, baloto k. t. p.). Ĉiu el tiuj punktoj aperos lumigite en la venontaj komunikoj.

\*

Ni petas niajn S. A. T.-ajn Kamaradojn reklami pleje pri nia 2<sup>a</sup> Kongreso. Ili faru tiel, ke eĉ ne unu esperantisto malscios pri nia Kongreso. Eĉ, ili informu la neesperantistan amason per notoj, artikoloj en la nacilingvaj gazetoj proletariaj.

Ne prokrastu la sendon de via aliĝilo.

Revoluciulan saluton al ĉiuj:

La Prezidanto de la Kongreskomitato

*Jean Roth*

Rodelheimer Landstr. 131 III

*Frankfurt a. M.-Rodelh.*

## NOTOJ

### Komuna lingvo estas unuecigilo

Aparta speco de unueco konsistas en la sameco de lingvo. Ofte lingvo fariĝis la rimedo unuiganta diversajn naciojn kaj rasojn. Tion oni spertis precipe en la orientaj landoj. Ekzemple Egiptio estis aparta nacio. Ankaŭ la Asirianoj fondis grandan regnon. La civilizacio de la Kaldeanoj estis eminenta en la malnova kultur-mondo. Unu lingvo fine superis la aliajn kaj unuigis la Kaldeanojn, Asirianojn kaj Egiptojn. Ĉiuj forgesis siajn gentnomon kaj unuigis. Hodiaŭ ili estas nomataj Araboj. Kial? Ĉar la araba lingvo fariĝas reganta lingvo super la aliaj. Se ni hodiaŭ demandas Egipton, al kiu nacio li apartenas, li respondas: Mi estas Arabo! Same respondas Kaldeanoj kaj Asirianoj. Tio-ĉi pravas al ni, ke la lingvo kapablas unuigi la popolojn. — *Abdul Baha Abbas* (1913).

### Por kio oni uzas esperanton

»La bona hispano  
Ĉielon ami devas  
Dion, Landon, Reĝon,  
Kaj fidon kun honor;

Ktp. . . . . tiel en dek strofoj, subsignitaj de Pastro Mariano Mojado, en »Hispana Esp.isto«.

Kion pensas pri tio la partianoj de neŭtralmaniera propagando? — Ekz. la socialista k<sup>do</sup>, el Ĉeĥoslovakio, kiu estas reprezentanto de tiu gazeto? Ni senlace rediros: *Oni perfidas sian klason, helpante la esp.an propagandon en vicoj de kontraŭuloj.*

Ĉiu klaskonscia kaj konsekvenca esperantisto  
devas aniĝi S. A. T. !  
Petu la novan statuton.

## Por perfektigo

### Honoro perdita, ĉio perdita.

Kun kvazaŭfrenezaj okuloj Karlo ŝanceliĝante<sup>1)</sup> reiris hejmen<sup>2)</sup> noktomeze. Senbrue li malŝlosis la pordon, eniris sian<sup>3)</sup> skriboĉambbron kaj, sin lasinte fali sur seĝon<sup>4)</sup> ĉe sia skribotablo<sup>5)</sup>, li skribis la jenon:

„Al la sankta kaj nobla patrino, kiu vi estas kaj kiu min severe<sup>6)</sup> edukis dirante: „Honoro perdita, ĉio perdita“, mi devas konfesi, ho ve! ke mi forgesis viajn admonojn: lu<sup>7)</sup> ludamanto min allogis al monludejo: protektate<sup>8)</sup> de<sup>9)</sup> feaĉo, mi trifoje gajnis altan monsumon. Mi ebriiĝis<sup>10)</sup> kaj denove ludis, ludadis malgajnis ne nur la gajnitajon, sed ankaŭ, ve! la pruntedonitajon. Kial la morgaŭon<sup>11)</sup> mi ne kuraĝis konfesi tion al vi? Kial fidante la protekton<sup>12)</sup> de demono mi prenis monon de l'kaso de mia firmestro? Forludita<sup>13)</sup> ĝi ja estas, kaj perdinte tiun aliulan<sup>14)</sup> monon mi perdis mian honoron . . .“

Ĉe tiuj vortoj<sup>15)</sup> Karlo ĉesigis sian<sup>3)</sup> skribadon,<sup>16)</sup> ĉar aŭdiĝis<sup>17)</sup> raŭka ekkrio dum kvazaŭ kroĉiloj penetris lian<sup>18)</sup> ŝultron. Ili estis la fingroj de lia patrino, kiu pli blanka ol mortotuko staris malantaŭ li kaj ŝajnis statuo<sup>19)</sup> de la doloro.

„Patrino!“ veplendis Karlo.

Ŝi restis sen respondo.<sup>20)</sup>

„Kompaton!“<sup>21)</sup> humile petegis la kulpulo.

Tiam la patrino malrapide diris per voĉo de li ne aŭdita<sup>22)</sup>:

„Antaŭ kiam vi perdis la<sup>23)</sup> monon, vi perdis vian honoron; perdata<sup>24)</sup> ĝi estis, kiam vi ekpensis al la bankbiletoj, kies<sup>25)</sup> gardisto vi estis. Nun, Karlo, ĉio estas por vi perdita: via kasista ofico, via trankvileco, via konfido al vi mem, la estimo de via firmestro, la amo de<sup>26)</sup> via fianĉino kaj de via patrino.“

„Panjo, amu min ĝis<sup>27)</sup> mi mortos; mi tuj senigos<sup>28)</sup> min je la vivo, kiun al mi vi donis kaj je kiu mi ne estas inda.“

„Ĉu tiel vi redonos al ni la perditan honoron? . . . Ĉu tio malhelpos, ke oni malestime montros min kaj diros: Ŝia<sup>29)</sup> filo ŝtelis.“

„Patrino, kion mi faru<sup>30)</sup>, por malpligravigi mian senhonorigan agon?“

„Redoninte kiel eble plej multe de la<sup>31)</sup> forprenita mono ni forlasos la urbon kaj ĝiajn<sup>32)</sup> tentajojn.“

Karlo genuflekse diris: „Mi kuraĝe kaj vigle faros ian ajn laboron por rapide multenspezi en celo salde pagi; mian tutan liberan tempon mi uzos por igi vin feliĉa; ĉion eblan mi faros por ke vi pardonu kaj forgesu, panjo.“

Originale verkis Roksano.

El «La Marto», kun la afabla represpermeso de la verkintino.

## S. A. T.<sup>a</sup> Monkolekto por la malsataj Rusoj

### 5<sup>a</sup> listo de monoferantoj

K.do Gomez Ruperto 14 fr. fr.; K.ino Feuiller 5 fr. fr.; K.do Ŝilha (Praha) 9 Kr. Ĉ.; K.do Domolawski 250 mk. P.

Kun la antaŭaj listoj = 290,30 fr. fr., 314 mk. G., 450 mk. P., 9 kr. Ĉ.

## Klarigoj

(1) La adverbano finiĝon ni uzas, ĉar ŝanceliĝante = dum li ŝanceliĝis, t. e. adverbano prepozicion.

(2) Ni povus ankaŭ diri: reiri al sia hejmo, ĉar la prepozicio „al“ montras direkton; sed la adverba formo kun akuzativo montras, ke Karlo ne nur iras al la hejmo, sed plie eniras ĝin.

(3) Ĉar la skribado koncernas la subjekto ni uzas la posedan adjektivon „sian“.

(4) „Seĝon“ estas en akuzativo, ĉar estas movo kaj direkto.

(5) Ĉi tie „ĉe“ signifas „apud“ kaj montras senmovecon. Cetere, D<sup>ro</sup> Zamenhof neniam uzis akuzativon post „ĉe“.

(6) Atentinda estas la loko de l'adverbo, kiam du verboj sin sekvas. Ekzemple, se „severe“ estus inter edukis kaj dirante, oni ne sciuz, ĉu la eduko aŭ la diro estas severa. En la lasta supozo ni dirus „min edukis dirante severe“.

(7) Estas pli bone diri „lun tagon“ ol „Unu tagon“. Unu estas prefere uzata kiel nombrero. Ekz. „Unu tagon mi pasigos kun vi, t. e. nur unu.“

(8) „Protektate“ kun finiĝa adverbo, ĉar ĝi egalvaloras cirkonstancon, t. e. adverbano prepozicion = tial ke li estas protektata.

(9) „De“, ĉar la aganto, la protektanto estas ja la feaĉo.

(10) „Ebriiĝis“, ne ebriiĝis min, ĉar tute senkonscie li iĝis ebria.

(11) „La morgaŭan tagon“ estas ankaŭ bona esprimo, sed al ni ŝajnas, ke „la morgaŭon“, pli mallonga, estas pli belsona.

(12) D<sup>ro</sup> Zamenhof ĉiam uzis la akuzativon post la verbo „fidi“.

(13) „For“ signifas malaperiĝon; mono forludita signifas monon malaperiĝita de la ludo, t. e. monon malgajnititan.

(14) „Aliulan monon“ = mono de iu alia. „Alia mono“ ne taŭgus; tio ne signifus, ke ĝi apartenis al alia persono.

(15) Por montri samtempan cirkonstancon, oni uzas la prepozicion „ĉe“.

(16) „Ĉesigis sian skribadon“ = igis sian skribadon komenci ne esti (49a respondo de D<sup>ro</sup> Zamenhof). Diri „ĉesis sian skribadon“ estas io malkorekta.

(17) „Aŭdiĝis“, ĉar la patrino tute ne volis aŭdiĝi ekkrii; tial ago plenumiĝis sendepende de ŝia volo.

(18) Ĉar la ŝultro ne rilatas al la subjekto, tiel ni uzas „lian“.

(19) „Statuo“ estas en nominativo, ĉar ĝi estas ne rekta komplemento, sed atributo. La verbo „ŝajni“ montras ne agon, sed staton. „Ŝajnas statuo“ = estas kvazaŭ statuo.

(20) Neniam infinitivo sekvas la prepozicion „sen“; ĉi tiu, ĉiam antaŭas substantivon.

(21) La akuzativon ni uzas, ĉar estas subkomprenite „havu“.

(22) „Aŭdita“, ĉar ni volas diri, ke li antaŭe neniam aŭdis tiun voĉon. „Aŭdata“ signifus, ke kiam la patrino parolis, tiam li ne aŭdis.

(23) Ni uzas la artikolon, ĉar ni parolos pri definita mono pri la aliula mono.

(24) „Perdata“, ĉar ni parolas pri la momento mem de l'perdo.

(25) „Kies“ ĉiam ĵusantaŭas la substantivon, kiun ĝi rilatas. Post „kies“ neniam estas uzata la artikolo.

(26) „De“; la amo venas ja al li de la fianĉino. Ne perdita estas lia amo al ŝi.

(27) Neniam diru „ĝis kiam“, nekorekta estas tiu esprimo.

(28) Por esprimi tujan aŭ baldaŭan faron, oni uzas la estonteccan formon antaŭatan de la vorto „tuj“ aŭ „baldaŭ“.

(29) Antaŭ subjekto oni neniam uzas „sia“, tial, ni uzas „ŝia“.

(30) Ni uzas la ordonan formon, ĉar estas subkomprenite „vi volas“. Kion (vi volas) ke mi faru?

(31) Ni uzas „de la“ — ne „da“ — ĉar „monon“ determinas la vorto „forprenito“. Ni uzus „da“, se foriginte „forprenita“ ni dirus „kiel eble plej multe da mono“.

(32) „Tentajojn“ rilatas la komplementon, tial ni diras „ĝiajn“.

R.

## Lingvaj demandoj

Al S<sup>no</sup> L. C. — *Pri la akuzativo post "tra"*. — Povas esti, ke mi baldaŭ proponos al la voĉdonado de la Lingva Komitato, ke post prepozicio oni uzu la akuzativon nur en okazoj de *nepra bezono*, sed en ĉiuj iom dubaj okazoj oni ĝin ne uzu. Se la Lingva Komitato tion akceptos, tiam oni kredeble neniam uzos plu la akuzativon post la prepozicio "tra". Sed *ĝis nun* la uzado de akuzativo post "tra" tute ne estas kontraŭregula. Nominativon ni uzas nur post tiuj prepozicioj, kies senco estas ĉiam egala; ekzemple la prepozicio "al" ne povas unu fojon signifi direkton kaj alian fojon ne, tial ni post "al" ĉiam uzas la nominativon; sed ekzistas prepozicioj (ekz. "en", "sur" ktp.), kiuj per si mem *ne* montras direkton, tial, por esprimi direkton, ni uzas post ili la akuzativon. Al tiuj prepozicioj apartenas interalie ankaŭ "tra" kaj "kontraŭ", tial ni post la direktaj prepozicioj povas uzi ambaŭ kazojn, *malgraŭ ke en la aliaj lingvoj oni uzas post ili ĉiam nur unu kazon* (tiu ĉi lasta cirkonstanco kredeble estis la kaŭzo de via erara opinio, kvazaŭ ni post "tra" ĉiam devas uzi nur la nominativon). Estas vero, ke dum la diferenco inter "en" direkta kaj "en" sendirekta estas tre granda, la diferenco inter "tra" direkta kaj sendirekta estas tiel malgranda, ke en la plejmulto da okazoj ni povas egale bone, uzi la nominativon, kiel la akuzativon; ekzistas tamen okazoj, kiam estas dezirinde fari *diferencon* inter la ambaŭ kazoj. Ekzemple, irante tra la urbo, mi povas resti en ĝi sufiĉe longe aŭ eĉ tute ne forlasi ĝin; sed, irante tra la urbon, mi celas (tra la urbo) *eksteren* de la urbo. En la "Rabistoj" Schweizer tute bone povus diri: "la sono de lia nazo povus peli homojn tra trueto de kudrilo"; tamen la esprimo "tra trueto" estas multe pli forta, ĉar ĝi montras, ke la efiko de la sono estas tiel granda, ke homoj volus nepré veni *eksteren*; tie ne la trueto mem estas grava, sed nur la celado esti kiel eble plej baldaŭ *ekstere* de la trueto.

L. L. ZAMENHOF (1908)

## Alvoko al la tipografistaro!

Karaj kolegoj! La tipografistoj estis la unuaj, kiuj fondis Internacion profesian. Ili kvazaŭ estis pioniroj inter la laboristaro. Laŭ tiu ĉi tradicio ni zorgu, ke ni ankaŭ estiĝu pioniroj rilate la esp.an movadon. Tial ni proponas, ke en ĉiuj terlokoj la esp.-tipografistoj ataku sian tipografistan asocion proponante, ke la Tipografista Internacio akceptu kaj propagandu esp.on. Sekve de tio la esp.-kolegoj devas prezenti siajn servojn kiel tradukantoj al la koncernaj asocioj. Ni kuraĝu prilabori kiel eble plej vastan kampon por detruĝi la ekzistantan opinion ĉe kelkaj ke la esp.-istoj kvazaŭ nur estas sektemuloj.

*Tipografista Esperanta Grupo.  
Leipzig, Germ.*

## Preseraro

En la februara n<sup>o</sup> enŝoviĝis eraro, kiu tute aliigas la sencion de la koncerna frazo. Sur la dua paĝo, 24a linio de supre, dekstra kolono, oni legu: *komplikeco* (kunkulpeco, kunpekeco) anstataŭ „komplikeco“. Pri kelkaj aliaj eraroj ne estas necese reĝustigi; jam certe la legantoj mem tion faris. — Red.

## Orakolo por 1922<sup>a</sup>

Kaj paroladis Zaratustro:

Jen grandajn miraklojn orakolas mi: en 1922<sup>a</sup> ŝanĝiĝos ĉio. Pereos la tunikaj kavaliroj de mallumigo, pereos, kiuj la miliojn fajren pelis, pereos, kiuj miliardojn »honeste« akiris pereos la homoj de l'*Estinteco*: la pereigintoj, la kredigantoj, la »diligentaj« trezorkolektintoj, pereos la aristokratoj de l'rango kaj naskiĝo, la grafoj de l'materialismo, pereos ĉi-ĉiuj, ĉar la organizita armeo de milionoj: de la laboro venkos 1922<sup>e</sup> ĉar la ejon de malgrandaj granduloj de l'*Estinteco* okupos la grandaj malgranduloj popolaj de l'*Estonteco*, pereos ili ĉiuj, ĉar la estinto apartenas al *Estinteco* kaj al *estonteco* la *Estonto*, ĉar la havo de malmultoj produktis la malhavon de multoj, kaj ĉar la malhavo de multoj subite heligis la okulojn ĝis nun blindajn de malhavantoj.

La pluso de l'antaŭmilita produkto kaŭzis la postmilitan minuson materian kaj ĉi-minuson povos nur la pluso de l'laboro malaperigi. Sed tiam la *Laboro venkos*, — kiel venkis la sklaveco la tiranecon de l'Romo, la scienco la fanatikecon de l'mezepoko, la rajtegeco de l'franca revolucio la vasalecon.

Kaj ja povas mensogi kiom ajn la sinprostituintoj spiritalaj — la burĝaj ĵurnalistoj, ĉi tiuj abomenantoj lumon de l'*Estonteco*: la glavon la martelo, la kason la falĉilo, la turon templan la lumturo de la scienco anstataŭos.

Ĉioj ŝanĝiĝos, ĉar alvenis la tempo de Malhavo klariĝanta, la tempo de l'skolo de Malhavo. La homoj malhavantaj fariĝos homoj estontaj kaj ve al Sinjoroj de l'Havo, ĉar ili interne mortmalsanuloj nesaveblaj estos trovontaj.

La milionaj malhavintoj venkos la kelkajn friponojn de l'»Havo« kaj ili ne esperu helpon de la ankoraŭ neŭtraloj, ĉar la »Malhavo« ĉie alvenos 1922<sup>e</sup>.

Havantoj de milionoj ekvekiĝu el sonĝo de l'via eterna regado: 1922<sup>a</sup> ne estos via jaro.

Entombigo estos ĉi-jare: la *Estonteco* tombigos la estintecon.

Kaj revekiĝos spiritoj de l'Laboro, de l'Scienco, de l'Arto, ke ĉi tiuj en sia neniam vidinta grandeco feliĉigu la ĝisnune elfermitojn.

Tiel estos el la »Malhavo« »Havo«, kaj el »havo« »malhavo«.

Kaj ĉi tio estos, la Nova Mondo, de l'Multoj, de l'Feliĉigitoj, de l'Multego Regonta, kaj la malnova »bona« mondo de malmultoj por ĉiam malaperos.

1922 — o — venu! . . .

Jen ĉi tiel paroladis Zaratustro.

R. A. Fanta.

## Al niaj abonantoj

Ni petas ĉiujn abonantojn, kiuj estas informitaj de nia administracio pri finiĝo de sia abono, bonvolu kiel eble plej baldaŭ sendi sian reabonon por eviti al si interrompon en la ekspedo, kaj al ni senutilajn klopodojn.

## KRONIKO

### Aŭstrio

*Linz:* Ankaŭ en nia lando la ideo pri neceseco de esp.o por la Laboristaro enŝovigis en la spiritoj. Diversaj grupoj jam kaŝe (?) ekzistas kaj nur mankas al ili interrilatoj kaj organisma unuiĝo.

Dum decembro kunvenis en *Wien* kelkaj k<sup>doj</sup> de la distrikto. K<sup>do</sup> *Otto Stöber* (adreso: Humboldtstr. 46, *Linz* a.D.) estis komisiata por starigi la necesan unuiĝon en la kadro de S.A.T. Por efektiviĝi tion la *Linz*a Grupo invitas la kamaradojn el Aŭstria kaj Sudbavara regionoj, al fondiga konferenco okazonta la 24- kaj 25-marto en *Linz*. K<sup>do</sup> K. Deubler el München ĉeestas kaj pritraktos la temon pri siaj ĝisnunaj spertoj kaj pri la irenda vojo.

La k<sup>doj</sup> el la tuta mondo estas antaŭdanke petataj helpi al nia movado en la klerikala Aŭstrio per sendo de ĉiuspacaj propagandiloj. — *Otto Stöber*.

### Britio

*London:* K<sup>do</sup> P. G. Cameron gvidas esp. kurson en la *Laborista Kolegio*

### Finnlando

La studo-rondo de la *Laborista Societo* en *Laut-takytta* havas esperanto-fakon. Sub ĝia aŭspico okazas kurso kun 12 p. — La esperantista grupo "Antaŭen" aranĝis plurajn kursojn: 42 p. Instruas k<sup>do</sup> *Lundstrom Arne*, *Papinkatu 8, Tampere* (Finnl.)

### Francio

*Marseille:* Okaze de l'nacia Komunista Kongreso, la k<sup>doj</sup> *Lantheaume, Angeletti, Drevet, Mobat* k. a., post permeso de l'organiza komitato, surgluis priesperantajn afiŝojn por atentigi la kongresantojn pri esp.o. Tio bone efikis. — Laŭ komunikado de *Moreno*

*Paris:* La *Esperantista Federacio-revolucia* eldonis (12 000 ekzemplero) porvarban n<sup>on</sup> de "L'Espérantiste Révolutionnaire". Ĝi estis sendita senpage al la 6000 abonantoj de pedagogia revuo: "L'Ecole Emancipée" (Liberigita Lernejo). La Federacio intencas eldoni ĉiutrimonate similan n<sup>on</sup>

### Germanio

*Cassel:* Pluraj kursoj kun 90 gelerantoj. Bona grundo por S.A.T. — K<sup>do</sup> *Deiters, Fr.*, *Schillerstr. 29* k. II

*Dresden:* Antaŭ kelkaj semajnoj okazis, ke gek<sup>doj</sup> komunistaj el Svedio trapasis nian urbon. Anstataŭ viziti la laboristan esp.rondon, ili iris al U.E.A. k. t. p. kaj ignoris la G.L.E.A.-kaj S.A.T.-grupojn. Strangaj komunistoj!

Socialistaj kaj komunistaj esp.istoj bonvolu atenti, ke en Dresden ekzistas S.A.T.-grupo ĉiutempe preta plenumi ĉiujn servojn difinitajn en la statuto. Travojaĝantaj k<sup>doj</sup> bonvolu viziti nian grupon, kiu kunvenas ĉiujauĝe en popoldomo, *Ritzbergstr.* Bonvolu informi la sekretarion pri alveno, dezirata loĝejo k. t. p. Adreso: *Paul Köckeritz, Tharandterstraße 6 IV, Dresden-Löbtau*. Andaua adreso: *Dresden-Uebigau, Kaditzerstr. 18*

### Italio

*Roma:* La movado ĉi-tie estas nun "halta". Nia: *Roma Internaciista Esp. Grupo* enkalkulas ĉirkaŭ 60 membrojn. Sed malmulte da ili bone konas nian lingvon. Pro tio ili ankoraŭ ĉiuj ne aliĝas S.A.T., sed tuj post plena esperantistiĝo ili certe "Satanigos". El la provincoj ni ricevas bonajn sciigojn pri la vigleco de nia movado: Grupoj starigis en *Piacenz-a, Imola* (Bologna) Komunista Sekcio de *Torre Annunziata* (Napoli) aliĝis unuvoĉe al nia esp. propagando. Baldaŭ starigos aliaj grupoj en *Sicllio, Apulio, Liguria, Giliannova* (prov. de Teramo) kaj *Ancona*. — Laŭ komunikado de k<sup>do</sup> C.W.

### Polio

*Lodz:* Post zorga propagando en la loka semajna gazetararo kaj parolado de k<sup>do</sup> *J. Lys* ĉe granda kunveno de profesiaj unuiĝoj, estas malfermitaj 4 kursoj, partoprenitaj de 175 gelerantoj. Tio estas la unua paŝo de la *Lodz*aj laboristoj por proksimiĝo al niaj eksterlandaj kamaradoj, la unua kadro de la tieaj sennaciuloj!... — La Sek. *March Hermann*

### Rusio

*Nijnij-Novgorod:* La tiea *Esp. Informejo* (adreso de la informestro: K<sup>do</sup> *Hermann Konovalov*, *Teatralnaja pl. 6, 9*), entreprenis enketon pri la nuna stato de esp.o en Rusio. Ĝi sendis 200 demandilojn kaj ricevis nur 30 respondojn. Notinde estas, ke *Petrograda S.to "Espero"*, *Moskva Esp. S.to, Kronstadta Grupo* tute ne respondis. El la materialo ricevita, "Ruĝa Esperantisto" (adreso: 9. Mironosiekaja *N.-Novj gorod*) publikigas raporteton el kiu ni ĉerpis la jenon: "En granda plimulto da urboj esp.o ne ankoraŭ troviĝas sur inda alteco... Kie esp. organizaĵoj estas oficiale (!) subtenataj de sovjetinstitucioj, tie esp.o bone progresas (Omsk, Vitebsk, N.-Novgorod) Ĝeneralmaniere la sovjetinstitucioj, rilatas al ni aŭ bone, aŭ indiferece (pli ofte mezbone). Nur unufoje okazis, ke sovjetanoj malbone rilatis al esp.o. Kredeble tio estiĝis pro reciproka nekomprenejo... Esp. societoj emas eldoni propran "presorganon", aŭ pli ĝuste presorganacon, mane aŭ hektografie. En plej bonaj okazoj aperas en rusa lingvo presitaj aŭ maŝine skribitaj gazetoj... Malmulte da anoj flue parolas la lingvon... En multaj grupoj ne estas komunistoj..."

*Sovjetlanda Esperanto-Servo* starigis laŭ decido de la *3a Tutruslanda Kongreso* okazinta en Petrograd, en 1921. Ĝi celas interrilatigi ĉiujn grupojn kaj izolulojn. La ĉefdelegito de tiu organizaĵo estas k<sup>do</sup> *A. Radinkov*. Adreso: *Moskvo, Poŝtkesto 666*

### U. S. A.

*Philadelphia.* — La esp. movado ĉi-tie estas malvigla. Ekzistas tamen burĝa organizaĵo, kies membroj kunvenas unu fojon monate en hotelon por vespermanĝi kaj paroli... angle. Post la "barĉo" ili disiras adiaŭante unuj la aliajn per esperantaj vortoj. Jen la tuta laboro de la *Phil. Esp. Societo*.

La 8. Januaro estis starigata verd-ruĝa *Esperanto-Grupo Antaŭen*. La sidejo estas ĉe la *Radikala Biblioteko, 942 N. Franklynstr.* Ni havas jam tri kursojn, mardon kaj jaŭdon angla esp.o kaj merkredon juda-esp.o. La anoj estas judoj kaj la celo de la grupo estas disvastigi esp.on ĉe la juda laborista organizaĵo. Ekzistas ankaŭ *Pola Esp. Grupo*, kiu gvidas kurson por Poloj. — Laŭ komunikado de k<sup>do</sup> *M. Perlow, 762 So. 5<sup>th</sup> str., Philadelphia Pa.*

## Leterkesto:

La k<sup>do</sup> el *Plovdiv* (Bulgario) kiu sendis al ni abonon forgesis meti sian nomon. Li bonvolu konigi ĝin al la Administracio, se li deziras ricevi la gazeton.

## Aĉetu!

10 belegajn diverskolorajn poŝtkartojn kun teksto rek-lama pri la 2<sup>a</sup> Kongreso de S. A. T. Ili estas haveblaj por 3 respondkuponoj (10 M. por germanoj) ĉe K<sup>do</sup> *Kempinski, Kronprinzenstr. 17, Frankfurt a. M.*



(1) Tio ne plu okazas de post la nova ekonomia politiko. — Red.

## Sennacieca Asocio Tutmonda

23. Rue Boyer, Paris-XX<sup>e</sup>

### OFICIALA INFORMILO

**Celo:** Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la statuton).

**Jarkotizo:** Laŭ valoro de unuhora salajro meza — Anglio, 17 pencoj; Aŭstrio, 42 kr.; Belgio kaj Francio, 2,50 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 8,50 lev; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 7 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 1,70 kr.; Germanio kaj Finnlando, 7 Mk.; Hispanio, 2 pes; Hungario, 17 kr.; Italio, 3,40 lir.; Nederlando, 0,85 Guld.; Polio, 85 Mk.; Svisio, 1,70 fr. sv.; Usono, 35 cent., k.t.p.

**Membreco kun jarabono al «Sennacieca Revuo»:** Multobligu la tarifon de membro per 4. — Ekz.: en Germanio, membro pagas 7 Mkg., abonanto 25 Mkg., membro-abonanto 28 Mkg.

(La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu prefere per naciaj monbiletoj, en registritaj leteroj; la aliaj laŭvole).

\*

La 1-2. 1922, al ĉiuj S.A.T.-anoj ni sendis specialan cirkuleron pri nia 2a Kongreso. Ĉar la afero urgas, kaj ke la gazeto aperas nur unu monato post la redaktado de la informilo (pro la distanco de Paris al Leipzig) ŝajnis al ni utila uzi tiun rapidan rimedon por informi la Satanaron.

Alie ni publikigas la 2an Komunikon de la Kongreskomitato. Ĉiu ĝin legu atente. Niavice ni petas al ĉiuj Kamaradoj fari plej eble da propagando pri nia Kongreso, eĉ ĉe la neesperantistaj medioj. Jam la franclingva komunista gazeto «L'Humanite» akceptis 40 linian artikolon de nia redaktoro.

En ĉiu kunveno postulu la diskuton pri nia Kongreso. Ĉiu proletaria grupo devus sendi unu delegiton al Frankfurt. Ĉiu grupano allasu kelkajn monerojn ĉiusemajne, kaj tiel la vojaĝa buĝeto estos rapide kovrata.

Ni atentigas la legantojn pri la lastaj linioj de la Komunikilo. Ni dankeme akceptos ĉiujn sugestojn kaj proponojn pri la jenaj punktoj: delegito, mandato, izolulo, voĉdonrajto, baloto, k. t. p.

Certe, ni ne dubas ke, sub la gvido de Jean Roth, la Frankfurt'aj Kdoj patreze zorgos pri la Kongreso. Ili sin donos tute, la aranĝoj estos perfektaj. Sed pezega estas tia tasko. Se ni ne povas ilin helpi en la materia flanko, ni povas ilin helpi en la preparo de la laborplano. Tion ni faru.

\*

De kelkaj semajnoj la sekretariejo estas supersutata de poŝtaĵoj; ja, la aliĝoj falas kvazaŭ pluvo. En 2 monatoj: 150 novaj membroj. Ni komencas la naŭan centon. Ni preskaŭ bedaŭras ke nia jarlibro estas baldaŭe aperonta, ĉar post 2-3 monatoj, ĝi estus entenanta pli ol 1000 adresojn.

Tiuj 150 novaj S.A.T.-anoj devenas de plej diversaj lokoj. La tuta nomenklaturu postulus tro da spaco, tial ni citu nur kelkajn urbojn: Hohenstein 6 membroj, Breslau 5, Essen 3, Erfurt 4, Magdeburg 4, Ingolstadt 2, Düsseldorf 2, Gera-R. 4, Hamburg-Altona 12, Miesbach, Traunstein, Burgstädt, Bremerhaven, Merschied 6, Solingen 5 (Germ.), — Tampere 12 (Finnl.), — Nynasgard 3 (Svedio), — Košice 7, Prešov 3 (Ĉekosl.) — Milano 4, Imola, Bologna (Italio), — Sofia 3, Plovdiv (Bulg.), — Moskvo, Rojdanovo, Romny, Nijnij-Novgorod (Rusio), — Tarare (Francio), Rockford (U.S.A.), — Chojnice, Kartuzy, Lodz, Bialystock (Polio), La Hulpe (Belgio), — Perth (Aŭstralio), — Nelson (Anglio), — Enschede (Hollando), — Enguera (Hispanio), — Marrakeck (Maroko).

14 novaj membroj en Budapest, 3 en Bruxelles, 10 en München, 14 en Dresden, 2 en Cassel, 2 en Berlin, 2 en Paris, 26 en Leipzig. Kun 71 membroj tiu ĉi urbo la rekordon tenis dum kelkaj tagoj, sed Troyes (Francio), ĵaluzo, ĵus rekonkiris sian rangon per 85 membroj por 1922. Kompense, Leipzig havas 70 abonintojn al *Sennacieca Revuo*, tiuflanke, ĝi timas nenian konkurencon. La Leipzig'anoj distingigas. Specialan mencion meritas niaj Kdoj F. C. Richter kaj Lerchner kiuj prenis sur sin la taskon de perantoj inter ni kaj nia presisto.

\*

Sekve de pluraj informetoj pri varbo de subtenantaj membroj, la Iniciatora Komitato (en sia lasta kunsido) fiksas la jarkotizon de tiaj membroj jene:

#### Subtenanta membro.

**Individua:** sama kotizo kiel tiu de aktiva membro.

**Grupa:** Kotizo ne difinita, sed almenaŭ kvaroble pli alta ol tiu de aktiva membro.

Tiun lastan punkton ni detale klarigos en venonta Informilo. 8. februaro 1922 La Sekretario de S.A.T.



## KORESPONDADO

**TARIFO:** Unu enpresoj, 0 fr. 75. — Tri enpresoj, 2 fr. Dek-du enpresoj, 6 fr.

**MALLONGIGOJ:** L = letero. PK = poŝtkarto. PI = poŝtkartoj ilustritaj. PM = poŝtmarkoj. bfl = poŝtmarko sur bildflanko. k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj. Esp-aĵo = Esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiuj ili sin enskribigis.

#### Aŭstralio

E. M. Leighton, Box 77, G. P. O. Perth. L, PI, k. ĉ. l.

Rikardo J. Dodd, 35 Francis street, Glebe, Sydney. PK, L, precipe kun Francoj.

#### Belgio

Kdo Léon Bergiers, 11 Rue Lauwers, La Hulpe (Province de Brabant). L, PK, k. ĉ. l.

#### Ĉeĥoslovakio

Kdo Jozef Schvarecz, Sobinovsko ulcice 35, Prešov. L, PI, k. ĉ. l., gelaboristoj.

Kdo Jozef Roth, Trhoviskv 3, Prešov. L, PI, pri iuj ajn temoj, k. ĉ. l.

#### Germanio

Kdo Robert Schill, Leipzig, Südstr. 10. Kun ĉiuj landoj.

Kdo Alfred Bürger, Radebergerstr. 34, Dresden-N. 8, PI, L, k. ĉ. l.

Kdo Alfred Hartung, Opperstr. 10, Dresden-N. 12.

Kdo R. Mahns, Röntgental (Mark), Schillerstr. 11, petas alialandaju kdojn sendi al li 50 malsamajn PM de sia lando, li resendos tiom de germ. PM.

**Hungario**

K<sup>do</sup> *Gattyán, Martin.*, Istvan ut s. 12, *Budapest IX.*

**Rusio**

*Vs. Basov*, 2 Posadokaja 19, *Orel*, pri infana psikologio, psiko-tekniko.

**Svedio**

K<sup>do</sup> *Lundqvist, P. S.*, Örnshöldsrik, L, Pl, PM, bfl, gazetoj, libroj, k. ĉ. l.

**U. S. A.**

K<sup>do</sup> *M. Perlow*, 762 So. 5<sup>th</sup> str., *Philadelphia, Pa.*, malnova ano de I.W.W., kaj redaktinto de "Industrial Arbeiter" estas preta doni ĉiujn detalajn informojn pri la fame konata organizaĵo, kies 20 000 anoj estas malliberigataj. Oni povas skribi esperante, angle, ruse kaj hebree. Se oni deziras ricevi presadojn pri I.W.W. en angla, rusa, itala, hispana, hebrea, hungara, bulgara, ĉeĥa, rumana, finna lingvoj sendu unu respondkuponon. Oni skribu legeble.

Edukistoj kaj ĉiuj eĉ ne-edukistoj interesataj pri: Klasbatalo-Lukto kontraŭ malamo kaj milito en lernejo-starigo de racia "Universala Uniforma Lernejo" — anigu al:

**Edukista Internacio**

(pacifismo, esperanta bulteno, porinfana literaturo, interŝanĝo de infanoj dum libertempo, studaj vojaĝoj, edukistaj internaciaj kongresoj).

Sin turni al: *Marcel Boubou*, 96, rue St Marceau, *Orléans* (Loiret) — Francio.

**Kamaradoj ĉiulandaj!**

La "Hungara Esperantista Societo Laborista" sciigas la fondaĵon de laborista koruso esperanta, dediĉita por la intensiva propagando de nia ideo inter laboristaro, atingota per kantoj en Esperanto. Tiu ĉi koruso jam montris belajn sukcesojn kaj nia societo volis ĝin kreskigi ĉiamaniere. Bedaŭrinde, nia societo pro malriĉeco kaj pro persekutadoj de la registaro ne povas ebligi sian intencon sen helpo de tutmonda kamaradaro kiun ĝi alvokas pri sendo de partituroj, notoj kaj mensendoj, kiujn la societo dankeme akceptos. Ĉiu sendaĵo estu adresata je la jena adreso:

Centra komitato de "H. E. Societa Laborista"  
VII. Dohány-u 71. I. Budapest

**Ruĝa Esperantisto**

Organo de Nijnij-Novgoroda Klubo de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo. Preskaŭ tute en esperanto. Artikoloj, rakontoj, versaĵoj, enloka kroniko, oficiala kaj koresponda fakoj. — Redakcio kaj administracio: Mironosickaja 9, N-Novgorod, Rusio  
I/II-22 aperos N=3. Specimeno estas havebla interŝanĝe de 3 resp. kup. aŭ de alio samvalora

**IUS APERIS:**

# For la neŭtralismon

de

**Sennaciulo**

Trezo aŭfranke: 1 ekz.: 2,— mk. 9. por landoj kurzsufertantaj rilate al franko,

1 ekz.: 0,50 fr. fr. por Francio kaj ceteraj landoj.

Havebla ĉe *S. A. T.* 23 rue de Boyer, Paris XX.

la germanianoj mendu al nia agento:

K<sup>do</sup> *Richter, F. C.*, Sommerfelder Strasse 44 ptr.  
*Leipzig-Stötterth*

## Nia Librejo

novaj prezoj — oni aldonu por sendkostoj: 20%. Adresu la mendojn al *L. Glodeau*, 177, rue de Bagolet *Paris* (XX):

**Verkaro de D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof:****Fundamentaj Verkoj**

Fundamento de Esperanto, Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro, Universala Vortaro

*Eldono kvinlingva* (franca-angla-germana-rusa-pola)

Unu volumo in-16, XI + 26 + 55 + 96-paĝa, fr. 3,00

*Eldono dulingva* (franca-turka)

Du volumoj in-16, 80 + 126 paĝaj, kune fr. 2,00

*Eldonoj en lingvoj*: bohema, greka, hungara, hispana, itala, rumana

Ĉiu eldono: unu volumo in-16, fr. 1,50

**Lingvaj Respondoj**

Unua serio: unu volumo in-8, 32-paĝa, fr. 1,50

Dua serio: unu volumo in-8, 32-paĝa, fr. 1,50

Fundamenta Krestomatio, Ekzercoj, Fabeloj kaj Rakontoj, Artikoloj pri Esperanto, Poezioj

Unu volumo in-16, 460-paĝa, fr. 8,00

**Tradukoj**

Tri verkoj de Tolstoj

Unu volumo 82-paĝa el rusa lingvo tradukis J. M.

Krimoj de Dio, de SEBASTIEN FAURE, el franca lingvo tradukita (32-paĝa), fr. 0,25

La Parlamentisma Iluzio, de C. A. LAISANT, el franca lingvo tradukita (12-paĝa), fr. 0,15

Hamleto, tragedio en kvin aktoj de SHAKESPEARE

Unu volumo in-16, 170 paĝa, fr. 3,00

La Faraono, romano de PRUS, el pola lingvo tradukis D<sup>ro</sup> K. BEIN

Tri volumoj in-8, 194-238-191-paĝaj, ĉiu fr. 4,00

For la bataliloj, de BERTHA VON SUTTNER, el la aŭstra-germana lingvo, trad. ARMAND CAUMONT

Unu volumo in-8, tolbindita, 320-paĝa, fr. 8,00

**Teknikaj Verkoj**

Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca, de ÉMILE

BOIRAC, kun la kunlaborado de ge-S<sup>oj</sup> FAUVART-BASTOUL

Du volumoj kaj Aldono, in-8, kune 430-paĝaj, fr. 10,50

Enciklopedia Vortareto Esperanta, kun klarigo en Esperanto kaj traduko en franca lingvo, verkita de S<sup>ro</sup> CH. VERAX kun kunlaborado de specialistoj

Unu volumo in-8, kartonbindita, 284-paĝa, fr. 10,00

**Por franclingvanoj**

Dictionnaire Complet Esperanto-Français

1 vol. petit in-16, de 288 pages, fr. 6,00

Dictionnaire Complet Français-Esperanto

1 vol. petit in-16, de 672 pages, fr. 10,00

Cours Rationnel et Complet d'Esperanto

Preface de HENRI BARBUSSE, 208-paĝa, fr. 5,00

## „La marto“

Oficiala organo de la ligo de Germanaj Esperantaj Societoj en Ĉeĥoslovakio.

Aperas ĉiumonate la 20<sup>an</sup>

Estas bone redaktata.

Enhavas kernajn, sciemajn kaj porperfektigajn artikolojn.

Kostas jare 16 K ĉ, por eksterlando 20 respondkuponojn (aŭ monbiletoj samevaloraj)

Adr.: *LA MARTO, Haida, Bohemio.*